

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Međem, bank-kaj fabri-
k-direktoro, Kaunas.

N-o 168
2. 12. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Prelato

D-ro A. Giesswein, Budapest †.

Tiu ĉi malnova kaj senlaca pioniro por nia afero ne plu estas. Ni publikigas ĉi-sube la malĝojigan informon de niaj hungaraj samideanoj. Kune kun ili funebros la tuta Esperantistaro pro la gravega, ne riparebla perdo.

La redakcio.

Morto

de prelato D-ro Aleksandro Giesswein.

Trarigardante la liston de mortintaj Esperantistoj, kiujn oni nomis „eminentuloj“, ni trovas, ke la plimulto el ili — spite de kelkaj homaj ecoj neperfektaj — estis ne nur idealistoj, sed ankaŭ idealaj homoj. Ili metis la fundamenton por nia movado, kaj ilia spirito kreis el niaj klopodoj realajn valorojn. Ilia ekzisto pravigis la moralan bazon de nia porhoma laborado. Ne nur por ni, sed por la tuta homaro ili signifis valorojn, kaj ni devas ĝoĝi, ke ni povas sekvi la vojojn de tiaj „veraj homoj“.

Tia vera homo estis D-ro Aleksandro Giesswein, papa prelato, prezidanto de la Hungarlanda Esperanto Societo. Nur estis — bedaŭrindege! —, ĉar subite, neatendite, la 15-an de novembro dumnokte trafis lian noblan koron post kelkhora suferado la bato de l'morto.

Multaj kongresanoj rememoras ankoraŭ pri lia staturo en la nigra pasira vestaĵo kun la violkolora rubando ĉirkaŭ la talio dum la Esperantistaj kongresoj de Antwerpen, Kraków, Bern, Praha, Nürnberg, kie li reprezentis la hungaran Esperantistaron, en Antwerpen eĉ la hungaran registaron. Al lia efika parolado ĉiam sekvis entuziasma aplaŭdo. Lia saĝo, bonvoleco, homamo elradiis el lia konduto, el lia rideto, el liaj vortoj.

Aleksandro Giesswein naskiĝis en la jaro 1856 en hungara urbeto Tata. Post studoj lernejaj kaj teologiaj li fariĝis en 1878 pastro kaj promociis kiel doktoro de teologio. En 1897 li fariĝis abato ĉe la episkopejo de Győr. De 1903 li estis subprezidanto de la Literatura, Scienca kaj Eldona Societo de Sankta Stefano kaj prezidanto de la Scienca Akademio de Sankta Stefano.

Lia laboro ampleksis lingvajn, prahistoriajn histori-sciencajn, religiajn, socialajn kaj kristanajn sferojn de l' homo scio. En 1887 aperis lia unua grava verko pri Mizraim kaj Assur. Liaj plej gravaj verkoj pri asiriologio, pri ĉefaj problemoj de komparanta lingvistiko, pri deveno kaj fundamentoj de religio, pri historia filozofio, pri sociologio, budhismo, kristanismo kaj liaj artikoloj samtemaj aŭ pri Esperanto, pacifismo kaj liaj mondkongresoj, kiujn li partoprenis, aperis en hungaraj kaj eksterlandaj eldonoj en lingvoj hungara, germana, franca, latina kaj Esperanto.

Li ludis gravan rolon en la hungara parlamenta vivo. Depost 1905 — do dum 19 jaroj — li estis seninterrompe deputito de distrikto Magyaróvár en la hungara parlamento. Li reprezentis precipe dum lasta tempo tute liberale la kristanan-socialan partion. En la parlamento oni ofte aŭdis lian voĉon pledantan por Esperanto. Lia politika agado laŭ karakterizo de la ĵurnalo havis nur unu celon: kiel eble plej multe utili por kiel eble plej multaj homoj! Kaj tiun principon li ne lasis spite de moko kaj atakoj de kelkaj flankoj.

Ne estas mirinde, ke lia vasta scienca kono, homamo kaj idealismo ne konis limojn kaj lia voĉo aŭdiĝis ĉe ĉiuj gravaj diverslandaj kongresoj kaj kunsidoj, kie oni laboris por la homaro. Li estis korespondanta membro de la Hungara Scienca Akademio, sed samtempe membro de

multaj eksterlandaj kaj internaciaj institucioj kaj societoj. Ĉe multaj el ili li havis gravajn rolojn en la estraroj. Li faris multegajn vojaĝojn tra tuta Eŭropo, vizitis Amerikon kaj ĉefe Kalifornion por tie studi specialajn problemojn socialajn. En Hungarlando li estis gvidanto de la Pacifista Societo kaj de la Lafontaine-Societo. Inter la membroj de la Societo por la Ligo de Nacioj li estis unu el la plej konataj.

Esperantisto li fariĝis en 1912, kiam li akceptis la prezidantecon de la Hungarlanda Esperanto Societo. Li jam partoprenis al la Volapük-movado. Sed kiel li mem rakontis, pro la malsukceso de Volapük li komence ne interesiĝis pri Esperanto, dubante pri ĝia valoro. Ne tre volonte li sekvis al pluraj invitoj de la Esperantistoj: sed ekvidinte la efektivan superecon de Esperanto al Volapük, li ekstudis la lingvon kaj baldaŭ surprizis per parolado en tiu lingvo unue de li ĵuĝita tre skeptike. Depost tiu ĉi tempo lia voĉo ne plu mankis ĉe internaciaj, landaj aŭ katolikaj Esp. kongresoj. Li estis en la gvidantaro de IKUE, de IKA, de MOKA kaj prezidanto de la laste fondita IPLE (Internacia Pacifista Ligo Esperantista). Dum multaj kongresoj li faris la sanktan meson kaj predikis en Esperanto. En la lastaj elektoj li fariĝis membro de la Lingva Komitato kaj reprezentanto de la hungara Esperantistaro en la Konstanta Reprezentantaro. Li estis kunlaboranto de „Literatura Mondo“ kaj skribis en kelkaj Esp. gazetoj.

Lia agado ne havis limojn; en ĉiuj fakoj, en ĉiuj societoj li partoprenis en la laboroj per sama energio. Pro tio li kompreneble ne povis dediĉi ĉiun forton al Esperantismo. Sed li apartenis al la apostoloj de nia movado, kiuj laboris por Esperanto ĝis la lastaj horoj. En lastaj monatoj aperis artikoloj de li en diversaj gazetoj pri alveno de nova Eŭropo, en kiuj li priskribis la Esperantajn kaj aliajn dumsomerajn kongresojn. La 27-an kaj 28-an de oktobro li ankoraŭ prezidis kaj parolis ĉe la ĝenerala kunveno Esperantista en Budapeŝt, la 5-an de novembro ĉe komitatokunveno Esperantista, kaj dum la lasta vespero li instruis pri nia lingvo la edzinon de lia nevo. Tio estis lia lasta faro!

Ni do plene rajtas mencii lin en la unua vico kun la gvidantaj spiritoj de nia movado, kiuj neniam laciĝas labori por nia afero kaj posilasas al ni post sia morto eternan memoron pri la ekzisto de veraj homoj.

* * *

La enterigo.

La 18-an de novembro, dimanĉe je plua posttagmezo, oni enterigis prelaton D-ron Aleksandro Giesswein.

Ĉe la tombo montriĝis, kiom ŝatata li estis. La urbo Budapeŝt donis por li en la centra tombejo honoran lokon, kaj el plej kontraŭaj partioj, el plej diversaj societoj kolektiĝis amasego da funebromontoj, kiuj eble neniam laborus kune, sed kiujn por unu horo kunigis la komuna simpatio al tiu vastanima pastro, la komuna funebro pro perdo de homo, pri kiu ĉiuj sentis, ke lia koro batis ĉiam por ĉiu suferanto kaj por ĉiu justa batalanto.

Laŭvice parolis la reprezentantoj de diversaj institucioj, partioj, societoj. Adiaŭis lin la Hungara Scienca Akademio, la Akademio de Sankta Stefano, krome la Pacifista Societo, kies aganta prezidanto li estis, la Feminista Societo, ĉar li ĉiam laboris por la rajtoj de l'virinoj, la kristana-sociala partio kaj la socialdemokrata partio, la Lafontaine-Societo por traduko de literaturajoj kaj multaj aliaj.

En la nomo de la Esperantistoj parolis subprezidanto de Hungarlanda Esperanto Societo s-o Stefano Nagy-Molnár en Esperanto, esprimente la dankon de la Esperantistaro kaj la esperon, ke lia granda, nobla spirito konsiante forigu nin por daŭrigi kun sukceso la komencitan laboron.



Prelato D-ro Giesswein kaj s-ino Moscheles en Hyde Park (London) inter samideanoj dum porpaca manifestacio.

En la nomo de Hungarlanda Laborista Esperantista Societo parolis ankaŭ en Esperanto ties prezidanto s-o Aron Mészáros.

Sur la tombo la landa societo metis modestan florkronon kun blanka rubando, sur kiu estis skribite per verdaj literoj: „Al nia kara prezidanto — la Hungarlanda Esperanto Societo.“ S-ano Laquer surmetis grandan florkronon en formo de verda stelo inter blankaj floroj, sur kies nigra rubando kun verdaj steloj staris en verdaj literoj: „En la nomo de la tutmonda Esperantistaro — Aleksandro Laquer.“ Tiun florstelon oni metis plej supre sur la tombon kredeble por montri, ke la Esperantistoj konsideris lin antaŭ ĉiuj aliaj celoj, por kiuj Aleksandro Giesswein laboris: por la paco, por interkompreniĝo, por disvastigo de kulturo, de literaturo, por venko de kristanaj ideoj, por rajto de subpremitoj, por helpo al mizeruloj.

Je komenciĝinta vespera krepusko la Esperantistoj de Budapeŝt malĝoje disiris, kvazaŭ ŝafaro sen paŝiisto.

Balkányi Pál, Budapeŝt.

* * *

Ni reproduktas konatan bildon de nia estimata mortinta samideano de unu el liaj vojaĝoj al Anglujo.

Dua raporto pri la tertremo en Japanujo.

Nia abonanto s-o Joŝicugu Okamoto, komitatano de Japana Esperanto Instituto en Tokio, sendas al ni la sekvantan informon: „Feliĉe mi povas raportii, ke la Japana Esperanto Instituto ne brulis, nek detruigis dum la terurega japana tertremo. Ankaŭ la biblioteko de la J. E. I. restis sendomaĝigita. Ankaŭ la presejo de la „Revuo Orienta“, Daidōsa, ne brulis. Kaj tial la Japana Esperanto Instituto tute ne suferas pro perdoj de materialo. Bedaŭrinde nur estas ke aro da japanaj samideanoj perdis la vivon kaj ke la Nippon Esperantosya, eldono de Esperantolibroj ktp. brulis. Sed post ne longe ĉiuj libroj de Nippon Esperantosya estos reeldonataj.“

La informo estas tre kontentiga kaj ni esperas, ke la teruraj sekvoj de l' tertremo neniel paralizos la aktivecon de niaj japanaj samideanoj.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciligojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraciuj aŭ privataj sciligoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legible (precipe nomoj)

Azio.

Nederlanda Hindujo.

S-o Pastro R. W. F. Kyftenbelt, ĝisnuna delegito de UEA en Menado, nun translokiĝis denove al Nederlando. Ni tre bedaŭras, ke nia ekstremlanda movado perdis tiom vigan kunhelpanton. Nij nederlandaj semideanoj povos esti fieraj pri lia kunlaboro, sendube komenciĝonta tre baldaŭ en la enlando.

Eŭropo.

Anglujo.

Federacio Esperantista de Yorkshire.

La 6. novembro 1902 sesdek disĉiploj de D-ro Zamenhof gvidataj de du fervoraj entuziasmojuloj s-o Joseph Rhodes kaj s-o John Ellis fondis la Esperantistikan Societon de Keighley, la pioniran grupon de Yorkshire kaj Granda Britujo.

La saman tagon en tiu ĉi jaro oni festis la 21-an jubileon.

Posttagmeze amasiĝis grupanoj kaj federacianoj el la graflando krom kelkaj el la najbara Lancashire.

La prezidanto pastro A. L. Curry kore bonvenigis ĉiujn per Esperantaj vortoj.

La prezidanto de la Federacio de Societoj en Yorkshire, s-o J. T. Holmes, skizis la laborojn de la fruaj jaroj, rakontis pri la persistemo de konvinkitoj, kaj sincere gratulis ilin nun pro la triumfoj gajnitaj kaj fakte merititaj kaj pro la kontentiga hodiaŭa bonstato.

Krom zorgado de studentoj ĉe la vesperiernejo teknika oni ankaŭ atentis ĝeknabojn dumtage. Muĉon oni ŝuldas al la ŝataj pioniroj, ĉiu slavice estas tiom proklamierne. La urbestro, hieraŭ elektita, kun sia edzino vizitis la kunvenon kaj deziris por nia movado ĉiaman sukceson en la estonteco. Por helpi al tio ili aliĝis al la societo. Tri muzikistoj plibeligis la kunvenon tre lerte per kantado. Ili estis anoj de muzikkonkurso, kiu antaŭ ne longe okazis en tiu ĉi urbo. La prezidanto de la Brita Esperanta Asocio bedaŭrinde forestis pro malsano. Tial oni laŭtegis poemon senditan de li, speciale verkita por tiu okazo.

Granda ĝoja familio en rondo unuigis, iuj babiladis, ĵurnalistoj petis informojn ktp. Tre ĉarmaj gesikantoj, prezentitaj de junaj infanoj, plue teatraĵeto „Angla lingvo sen profesoro“, intermiksita kun prezetatoj ĉiusepacaj, ĝuigis la ĉeestataron.

Je la adiaŭa horo, antaŭ ol reiri hejmen ĉiu fidele promesis duobligi la penojn por nia movado, ĝis „la tado kiu estas nun turnanta triumfe venkos“.

Mary E. Parker.

Ĉeĥoslovakio.

Esperanto-movado inter laboristoj.

Dum lasta tempo oni povas rimarki grandan movadon inter laboristaro de ĉiuj lokoj de la respubliko. La Esperantista laborista movado en nia lando estis ĝis la jaro 1920 tre malforta. Antaŭ la mondmilito, kiel vera kaj nalcigita batalanto por Esperanto inter laboristoj agadis s-o Jos. Pech. Li havis la plej grandan meriton pri Esperanto en Ĉeĥoslovakio. Li estis por Esperanto perskutita, precipe dum la milito, kaj li vagadis tra tuta Bohemio kaj ĉie vekis laboristaron, ke ĝi lernu Esperanton, ĉiudimanche aranĝis paroladon pri Esperanto en iu urbo aŭ urbetu. Li fine trovis komprenon kaj en la kurso Esperantista por komencantoj li gajnis kelkajn bonajn kunhelpantojn, kiuj laboras kun li ĝis nun. Disponente pri pli multaj kaj bonaj propagandistoj, oni povis pli facile eniĝi inter laboristoj.

La plej granda movado estas en Plzen (Pilsen) kaj ĉirkaŭaĵo. El tio rezultis la neceso fondi laboristan asocion, kiu koncentrigis la laboristaron. En la jaro 1922 kunvenis reprezentantoj de diversaj societoj por fondi „Laboristan Ligon Esperantistan“ en Ĉeĥoslovakio, kun centro en Plzen-Peklo. Kvankam ĝi ekzistas nur duan jaron oni povas esti kontenta pri la ĝis nun atingita, same pri la nombro de membroj. Oni renkontas al sukla komprene inter laboristaro kaj publiko. Grandan movadon oni povas ankaŭ rimarki en norda Bohemio kaj ankaŭ en aliaj lokoj de la respubliko.

La ĉeĥoslovaka laboristaro serĉas rilatojn kun aliaj laboristaj asocioj Esperantistaj kiuj volas serioze labori pri la disvastigo de Esperanto inter laboristaro por tiamaniere efektiviĝi la laboristan devizon, ke la proletaro de ĉiuj landoj unuigui!

La „Laborista Ligo Esperantista“ ankaŭ en la propaganda kampo klopodas kiel eble plej multe disvastigi Esperanton kaj zorgas ankaŭ pri eduko de siaj membroj, ĉefe la funkcioj, por aranĝi paroladojn pri Esperanto inter turistoj, gimnastikaj societoj k. s. — Aliĝo de laboristoj-semideanoj estas tre dezirata.

J. Pešek

Francujo.

Dijon. La urbestro s-o Gerard akceptis la honoran prezidantecon de la grupo. Nun, dank' el la klopodoj de D-ro Dard, s-o Ferrain kaj s-o Petit la antaŭ la milito tiel agema grupo restariĝis.

Lyon. La urbon vizitis tri eminentaj japanaj s-anoj: Kobayashi, Prof. de Politika Ekonomio en la jura fakultato de la Tokia Universitato, Toyohara, teknika konsilanto en la V-a Laborokonferenco kaj direktoro de la Prefekta Laboroficejo en Tokio, kaj Kono, lia sekretario.

Rosny sous Bois (Seine). La 18. novembro okazis la granda jara festo de la grupo sub la patronado de la urbestro; ĉeestis 400 personoj.

Germanujo.

Syke apud Bremen. 5. 11. 23 ĝenerala kunveno. S-o Beste raportis pri la pasinta jaro. Elekta la lokgrupestaro estas 1. prezidanto s-o Beste, 2. prezidanto s-o Sudmann, sekretario s-o Felter, kasisto kaj bibliotekisto s-o Lange. La lastnoma krome ricevis la funkcion zorgi pri la rilatoj al la gazetaro. S-o Heino Heilmüller, Bremen, fondinto de la grupo kaj gvidinto de la unua kaj dua kursoj, estas nomita kiel Honoro Membro.

— 4. 10. 25 komenciĝis nova (la tria) kurso kun 22 partoprenantoj. Gvidanto estas s-o Beste.

Jugoslavio.

Dubrovnik. Fondiĝis Esp. klubo. La intereso de la publiko daŭre kreskas. Urbaj gazetitoj favoras nian movadon. — Dubrovnik (Ragus) estas centro de mezepoka kulturo kaj civilizacio sudslava. dojita je ĉarmaj naturo kaj klimato kaj je interesa antikvaĵoj; ĝia vizito estas rekomendinda al ĉiuj turistoj.

M. M.

Rusujo.

Astrachan. Post dumtempa intertempo de laboroj la 1. 11. rekomencis la laboron du E-rondetoj en Laborista Klubo „Leitnanto Smid“ kun proks. 25 partoprenantoj. Baldaŭ tria rondeto estos kreata.

Socia vivo.

Elmigrado de laboristoj el la Lodz'a departamento (Polujo) al Francujo.

En kuranta jaro en la daŭro de ok monatoj, t. e. ĝis 1. septembro, forveturis Franciun el la Lodz'a departamento 6197 personoj. Elmigras precipe terlaboristoj kaj laboristoj senkvalifikaj al francaj minejoj.

W. Pf., Lodz.

Ekonomio.

La kostoj de la vivsubtenado en Rumanujo.

De la statistika sekcio de l' Finanzministerio eldonitaj indeksaj nombroj por la monato aŭgusto montras, ke la kostoj de la vivsubtenado en Rumanujo denove altiĝis. Tio ĉi estas malagrabla konfeso, ĉar la indeksnombroj en julio ja malaltiĝis je 4% komparante ilin kun tiuj de monatoj antaŭaj.

La vera multkosteco bazas sur la varoj importitaj de eksterlando, kiuj devas esti pagataj en fremda valuto.

La rumanoj, kiuj devas ĉi tie perlabori sian vivsubtenon, estas tre peze premataj per la prezaltiĝoj, ĉar la enspezo ne altiĝis laŭ sama mezuro kiel la nepre necesaj elspezoj. La situacio aspektas tiel, ke ŝanĝoj por longa tempo ne okazos.

(Speciala scigo de la Svisa kaj Rumana Banko, Bucuresti) P. By.

Aktuala politiko.

La parlamento de la nacioj.

La Ligo de Nacioj estas la unua proksimiĝo al mondparlamento. Kvindek kvar nacioj, kiuj entenas tri kvaronojn de la loĝantaro de l'mondo, jam aliĝis al la Ligo, kaj oni esperas, ke ĝi baldaŭ enhavos ankaŭ tiujn, kiuj ankoraŭ restas ekstere. Tio membra nacio sendas delegitojn al la reprezentantaro, kiu kunvenas ĉiun septembron en Genève. La konsilantaro, kiun oni povus nomi la kabineto de ĉi tiu parlamento, ĉar ĝi kunvenas pli ofte kaj prezentas rekomendojn al la reprezentantaro, konsistas el la kvar grandaj nacioj kaj ses aliaj nacioj elektataj ĉiujare. La sekretariaro, kiu daŭre laboras en Genève, estas speco de internacia ŝtatifistaro.

La laboro de la Ligo ne estas limigita al arbitracio inter malkonsentantaj membroj. Ĝia motivo estas „antaŭenigi la pacon kaj la internacian kunlaboradon“, kaj ĝi posedas multajn organizaĵojn, kiuj laboras por la dua celo laŭ diversaj metodoj: La Internacia Oficejo por Sano, kiu jam sukcese batalis kontraŭ tifo en Orienta Eŭropo; la Komisionoj pri la Opio kaj pri la Komercio en Virinio kaj Infanoj, kun kiuj Usono kunlaboras, kvankam ĝi ne estas membro de la Ligo; la Internacia Laboroficejo, kiu kalkulas Germanujon inter siaj membroj kaj kiu jam organizis kvin konferencojn por diskuti laborajn mondproblemojn, estas nur kelkaj branĉoj de ĝia laboro.

La plej grava porpaca laboro, kiun la Ligo faris, estas la traktatoj pri reciproka helpo, kiu estis prezentita al la lasta kunveno. Ĉi tiu traktato postulas, ke la nacioj, kiuj ĝin subskribas, ricevos de la aliaj subskribantoj garantiojn de defendo kontraŭ atako, kondiĉe ke ili limigu siajn armaĵojn al kiel eble plej malgrandeco. La interdependeco de la du flankoj de la traktato estas grava. Neniu ŝtato, kiu ne senarmiĝas, rajtas al la protekto de siaj najbaroj. Ĉi tio malhelpas la malnovan tendencon amasiĝi armaĵojn, pretekste por sindefendo. La traktato, kiu estas la frukto de dujara peno laboro de komisiono de spertuloj, estas nun dissendata al la registaroj por kritiko, kaj se ili ĝin konfirmos, la senarmiĝo baldaŭ devos efektiviĝi.

Lucey P. Mair, B. A.

Scienco.

Medicino.

Nova kuracilo kontraŭ la diabeto.

Bazante sur fakto, ke la produktado de glikogeno en la naturo ĉiam akompanas produktado de insulinspeca materio, s-o Collin J. B. esploris fermentilojn (mikrobojn). Ĉar liaj esploroj havis kontinentigan rezulton, li produktis ekstraktojn el kreskajoj pli altirangaj. Li trovis, ke la ekstraktoj malgrandigas la sukerenhavon de la sangoc ĉe normalaj kunikloj kaj hundoj senigitaj de ŝil-organismoj. La nova kreskaja hormono estas nomata glukokinino. Oni esperas, ke ĝi fariĝos efika kuracilo kontraŭ diabeto.

Josefo Major.

Kosmologio.

La kvanto de la tutuniversala energio.

Svante Arrhenius faris kalkulojn de vasta konceptio en la lastaj numeroj de la Franca Scienca Revuo. Kalkulante en 10¹² kalorioj, por unu jaro ni ricevas la energiokvantojn de la kosmo.

Suma Sunradiado	3.10 ¹⁸
Sur la Teron falas el tio	1350.10 ⁶
Sur la Tersurfaco falas	670.10 ⁶
Akvohaladado sur Teron	540.10 ⁶

Energio de ŝvebantaj akvogutoj	28.10 ⁹
Energio de fluakvo	58.10 ³
Utiligebla parto el tio	4.10 ³
Utiligebla parto de ventoj	55.10 ⁶
Energio enkaŝita de plantoj (latenta energio de la plantoj)	160.10 ³
Energio de la pojare forbruligata karbo	10.10 ⁶
Suma energio de la ekzistanta karbo	44.10 ⁶
Energio de la pojare konsumata petrolo	1.10 ³
Suma energio de la ekzistanta petrolo	12.10 ⁶

Jen inventaro de la Universos.

Josefo Major.

Lingvoj.

Kabardanoj, gento de kaŭkazaj montanoj, loĝantaj en Montana Aŭtonomia Soveta Respubliko (Antaŭ-Kaukazo), ĝis lasta tempo ne havis propran skribon. Nun la kabarda lingvo estas ankaŭ skribebla, dank' al profesoro de Orientalisma Instituto Jakovlev kaj Jarkov, kiuj verkis la alfabeton. La alfabeto havas latinan transskribivon.

Dni.

Internacia trafiko.

Aerveturado.

Flugo transatlantika.

La konata Zeppelin'a konstruado en Friedrichshafen estas finkonstruante por Usono aerkurso „Z. L. 5“, transportotan al Ameriko ĝis fino de nuna jaro. La aerspio entreprenos la transoceanan veturon post kelkaj provoflugoj en Germanujo. En sia konstruo la nova krozo similas la antaŭajn germanajn marajn aerspiojn de la L-klaso, ĝi estas nur iomete pli granda ol tiu. La nova aera giganto, destinita por la trafiko, estas konstruata laŭ la plej novaj progresoj de l'tekniko kaj estas movebla per Maybach-motoroj kun rapideco de pli ol 150 km pohore. La vojon Friedrichshafen — Sud-Francujo — Azoraj Insuloj — Bermudo — New-York (8000 km) oni esperas trafugi en 60 horoj.

La specialistojn interesos komparo de tiu ĉi aerspio kun la alia — „Z. L. 1“ — jus konstruita en Lakehurst laŭ Zeppelin'a sistemo. Tiu ŝipo, 227 m longa kaj 24 m alta, posedas plenan pohoran rapidecon de 121 km, dank' al ĉi ĝi povas konkuri kun la fervoja lokomotivo. Ĝi havas ses motorojn po 500 ĉevalfortoj, kaj ĝia agadkampo ampleksas areon de 6400 km². La ŝipanoj ĝin priservanta konsistas el 50 personoj. Estas mendinte, ke la halo de tiu koloso estas tiom spacgrandega, ke ĝi povus enteni la tutan Kapitolon en Washington, escepte ĝian 24 m altan kupolon.

En aerspio al Norda Poluso.

La Usona Admiralitato organizas aersipan ekspedicion al Norda Poluso. La ekspedicio estos zorge provizata per ĉiuj necesaj; precipe oni atentis, ke la partoprenantoj ne suferu por malvarmo. Estas notinde, ke la aviadistoj estos interalie ekipataj je botoj kaj gantoj varmigataj de elektra fluo.

Statistiko.

Poŝtarif-ŝanĝoj en Germanujo.

La sekvanta resumo vidigas interesan movigon de la tarifoj por poŝtendaĵoj en Germanujo. La ciferoj ebligas konkludojn pri la ekonomia situacio de tiu ĉi lando, sed devas esti dirate, ke la poŝt-tarifoj ankoraŭ tute ne konformiĝis al la vera situacio kaj sentigis ĝis nun ankoraŭ la plej tolerablajn prezaltiĝojn.

De	por poŝtkartoj enl.	leteroj entandaĵ	leteroj eksterlanden 20 g.
15. 1. 1925	25	50	150
1. 7. "	120	500	500
1. 8. "	400	1000	5000
20. 8. "	8000	20000	60000
1. 9. "	50000	75000	200000
20. 9. "	100000	250000	750000
1. 10. "	800000	2000000	6000000
10. 10. "	2000000	5000000	15000000
20. 10. "	4000000	10000000	50000000
1. 11. "	40000000	100000000	200000000
5. 11. "	500000000	1000000000	4000000000
12. 11. "	5000000000	10000000000	40000000000

germanaj markoj. O. R., Bamberg.

Filatelio.

Poŝtmark- kaj Esperanto-ekspozicio.

De la 2.—8. decembro ni aranĝos en Győr (Hungario) internacian poŝtmarkekspozicion kaj semajnon por poŝtmarkkomercistoj kaj por filatelistoj. Ĉiu povas partopreni. Oni akceptas en komisiono markojn por vendado, same kiel oni ŝanĝas poŝtmarkojn kontraŭ tiuj de pli granda valoro. Leteroj, demandoj, sendaĵoj estu senditaj al la adreso: Emeriko Steiner, poŝtmarkkomercio, Győr, Hungarlando, Király-str. 20.

Dum la ekspozicio ĉiutage okazos parolado pri Esperanto kaj precipe pri rilato inter Esperanto kaj filatelio. Se samideanoj partoprenus aŭ sendus poŝtkartojn, superfluajn poŝtmarkojn kaj sciligojn al la delegito de Győr, Georgo Steiner, Klezárstr. 12, Győr, ili tre antaŭe helpus la piforiigon de nia movado en Győr.

Internacia sporto.

Svedlando—Hungarlando.

La vetulo de la bonegaj trupoj okazis en Budapeŝt la 28-an de oktobro antaŭ multdekml-nombra rigardantaro. Hungarlando venkis la elegante ludantajn svedojn 2:1.

Al hodiaŭa numero estas aldonita „Por Distrado“.

La Konstanta Repraentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.) dissendis ĵus detalan cirkuleron al la diversaj landaj societoj, kiun ni represas ĉi-sube :

Konstanta Repraentantaro de la Naciaj Societoj

konsistanta el unu repraentanto de ĉiu Nacia Societo Esperantista.

(Starigita laŭ decido de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto — Helsinko 1922.)

Propozita Sideo: Esperantista Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Paris (9), Francujo.

Honorprezidanto: Generalo H. Sebert.

Prezidanto: S-o John Merchant (Sheffield, Anglujo).

Sekretario-kasisto: S-o Charles H. Edmonds.

Adreso de la Sekretario-kasisto: 21 Russellcroft Road, Welwyn Garden City, Anglujo.

Novembro 1923.

Al la Prezidanto

de la Nacia Societo Esperantista.

Estimata Sinjoro Prezidanto.

1. La kunsidoj en Nürnberg de repraentantoj de la Naciaj Societoj bonvolvis honori nin per la taskoj de Prezidanto kaj Sekretario-kasisto de la Konstanta Repraentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.), kaj, kiel unua devo, ni atentigas vin pri la protokolo de tiuj kunsidoj sur paĝo 162 (12) de „Esperanto“ por aŭgusto-septembro 1923.

2. Por ke ĉio estu en plena ordo, ni petas ke via Societo formale respondu, ĉu ĝi aprobas la elekton de estraro de K. R. farita en Nürnberg, nome: Honor-prezidanto: generalo H. Sebert, Prezidanto: s-o John Merchant, Sekretario-kasisto: s-o Charles H. Edmonds.

3. Ankaŭ mi petas, ke vi formale respondu, ĉu ĝi konfirmas la elekton de Centra Komitato (C. K.) laŭ la listo starigita en Venezia kaj Nürnberg interkonsente de la repraentantoj de la Naciaj Societoj kaj la Universala Esperanto-Asocio (UEA), nome: Sinjoroj Chavet (Interno), Dietlerle (Instruado), Hromada (Gazetaro), Kenn (Eksterĉirolaj aferoj), Page (Financoj) kaj Privat (Propagando kaj Prezidanteco).

4. Laŭ la decidoj de la Kongreso en Helsinko la K. R. zorgos pri la malsubteno de la Naciaj Societoj al la komunaj institucioj de la Esperantistaro. Ne estas necese ke ni montru al vi la gravecon de tiu subteno, ĉar vi bone scias ke sen financa helpo niaj oficialaj institucioj ne povas funkcii.

En Helsinko oni priparolis bazon, per kiu ĉiu nacia societo pagus po membro unu dekonon de ordinara individua kotizo al UEA. Diversaj malfacilaĵoj malhelpis la akcepton de tiu principo por la momento, kaj tial por la unua jaro la Naciaj Societoj pagu laŭ kapablo kaj bonvole kiel eble respektante la principon de Helsinko.

Por ke K. R. povu efektive funkcii estas urĝe ke vi sendu al s-o Edmonds, la Sekretario-kasisto, laŭ la supra adreso la kotizaĵoj de via Societo por la jaro 1923.

5. Ni petas ke vi samtempe sciigu al ni la nomon kaj adreson de via Repraentanto, kun kiu ni devas de nun korespondadi.

6. Kiam ni estos ricevitaj konfirmon de la Estraro de K. R. kaj de la listo de C. K., ni senprokraste komencos la laboron dissendante al la repraentantoj komunikaĵojn pri la estonta bazo de la kotizo, pri teknikaj konferencoj ktp.

Tro longe la Naciaj Societoj laboris sendepende, ĉar ili ja povas multe helpi unu la alian por la progresigo de la movado kaj la bono de ĉi homaro. Tial ni forĵetu tiun priorganizan disputon kaj per studo de metodoj, per reciproka kunlaboro por pli vastaj celoj, kaj per streĉo de ĉiuj fortoj por sukcesigi niajn klopodojn ni antaŭenmarŝu al tiu glora tago, en kiu la genia verko de Zamenhof ja finvenkos la mondon.

Al via societo ni sendas niajn plej korajn salutojn kun bondeziroj por la sukceso de ĉiuj viaj entreprenoj por la movado.

Trre altestime
John Merchant, Charles H. Edmonds,
Prezidanto, Sekretario-kasisto.

Al ĉiuj anoj kaj ĉefkomisiitoj de U. E. P. L.

Lia prelata moŝto D-ro Aleksandro Giesswein, nia kara prezidanto mortis! Grandega bato precipe por nia novefondita ligo! Li mortis en siaj grandvaloraĵoj laboroj en Budapeŝto la 15. novembro per korapopleksio. Mi tion preskaŭ ne povis kredi! Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis lian lastan bildkarton de la 8. novembro, kaj la 27. ĝis la 29. septembro li logis ĉe mi tute sana kaj peroladis temperementoplene okaze de la „Mondpacokvado vespero“ en la granda Esperanto-ekspoziciejo en Wien (vidu pri tio en ET 165, paĝo 11) kaj post lia vojaĝo al Holando kaj Anglujo li denove la 25. oktobro estis tute sana en mia hejmo. — Kaj nun li estas for por ĉiam! Li estas for, sed nur korpe, lia animo restis ĉe ni kaj devas esti nin ĉiujn, kiuj des pli vigle volas labori por la granda pacideo, por tiu celo, pri kiu li parolis la lastan fojon la 28. oktobro inter ni! Li ĝojis, ke dum la sekvonta jaro okazos la 1. granda kongreso de U. E. P. L. en Wien. Li ĝis aŭgusto volis ofte vojaĝi de Budapeŝto al Wien, por kiel eble plej bone aranĝi ĉion. En Budapeŝto li volis aranĝi psikologeson! Pri ĉio ĉi tio li parolis entuziasme. Ni nun plenumu lian deziron! Je lia memoro mi petas vin ĉiujn korege, helpu, faru ĉion laŭ lia intenco! Car ni Liganoj antaŭ la kongreso ne povas elekti novan prezidanton kaj ĉar pro nia packongreso la ĉef-

laboro estas tie ĉi en Wien, kiel Aŭstruja ĉefkomisiito de U. E. P. L. kaj kiel la respondeca aranĝanto de nia mond-kongreso mi faras jenajn proponojn:

1. La ĉefkomisiitoj kaj la aliaj liganoj proponu ĝis la kongreso taŭgan kaj kapablan estontan prezidanton. Li devus esti grandvalora pacifista persono kun internacia influo.

2. Intermunde kune kun la ĉi tieaj pacifistaj mi gvidas kiel afer-gvidanto la laborojn, konsiderante, ke la ĉeflaboro nun devas esti farata tie ĉi por nia kongreso.

3. Ĝis la kongreso la ĉefkomisiitoj en la diversaj landoj laboru sendepende kaj raportu pri siaj laboroj dum la kongreso!

Sendube tamen estas ne sole tre oportune sed eĉ nepra necese, ke la komisiitoj ankaŭ raportu al mi pri gravaj aferoj. Rilate miajn proponojn mi petas je konsento. La estontaj komunikaĵoj ĉiam aperos en ET.

Car la elspezoj por la antaŭlaboroj (por presado kaj por la poŝto*) estas tre grandaj, mi petas je bonvola malsubteno, precipe la bonvolajn landojn (bankletoj en koverto). Ju pli grandstila mi povos antaŭlabori, des pli efektive fariĝos la pac-kongreso! La kasisto de la packongreskomitato kaj mi respondos pri la elspezoj dum la kongreso. La kvitanco fariĝos en ET.

Rudolf Michael Frey,
ĉef komisiito por Aŭstrujo
Wien 11, Bechardgasse 14.

* por multege da Invitoj farsendotaj por E-lerndado jam nun al ĉiuj sekcioj de la diversaj internaciaj porpacaj kaj tiuj por-kulturaj organizacioj en la tuta mondo.

Pacifismo.

La sekretariejo de la Organiza Komitato de la Internacia Ligo por Malmarmado, 63, Hancock-street, Boston, Mass., Usono, publikigas la jenan alvokon:

Por la malmarmado!

La nuna tutmonda situacio politika pruvas la nepovon de la nacioj kaj de la Ligo de Nacioj rilate je malmarmado. Tamen ĉiu homo konscia je sia homvaloro malmamas militon kaj sekve celas al internacia malmarmado.

Ŝajnas, ke nur forta popolamasa movado devigos la registarojn komenci la malmarmadon.

Tial fondiĝis unuigita internacia por mem-malmarmado, kies celo estas arigi ĉiujn personojn el diversaj emoj politikaj, rasoj, lingvoj, sekso kaj aĝo, kiuj deziras subskribi jenan formulon:

Mi emas rezigni je ĉia militservo senpera aŭ pera, kondiĉe ke internacia centro por mem-malmarmado kreita per la Ligo de Nacioj kaj alportita de ĉiuj nacioj kunigos nombron da samcelanoj el ĉiuj landoj de sama kategorio laŭ milita vidpunkto, proporcie je la popolamaso de ĉiu lando kaj de mia, kaj kiuj emus subskribi libervole la saman promeson.

Prof. D-ro S. Puchleitner, Sekr. por Centra kaj Orienta Eŭropo, Redtenbacherg. 12, Graz, Aŭstrujo.

F-ino B. Wochele, Mühlstr. 18, Tübingen, Germ. S-o Leopold Katscher, Interlaken, Svisujo. S-o Ernest Peyrequin, Maison du Peuple, Avenue Beaumont, Lausanne.

Prof. Erna Lieboldt, Pstrossova 1, Prag I, Ĉeĥoslovakio.

Ivar Egmund Mortensson, pastro, Einabu (Alvdal), Via Kristiana, Norvegujo. S-o René Valfort, sekr. de Union pop. p. la Paix, 4, Avenue d'Ingres Paris.

Rev. Herbert Dunning M. P., 47 New Broad Street, London. Erna Jüllig, sekretariino de la Ligo (Liga adreso).

Atentinda sukceso.

La raporto de la Komisiono de la Nomenklatur-Farmacia, kreita de la Internacia Federacio Farmacia en 1922, enhavas, apud latina teksto, tradukon de ĉiuj terminoj en Esperanto. Tiun sukceson ni ŝuldas al nia malnova ŝatata samideano kaj fakvortaristo s-o Rousseau, eksprez. de la Sindikato de Francaj Farmacistoj en Levallois-Perret, Seine (Francujo).

Bibliografio.

Libroj.
Eugen Wüster, Encklopedia vortaro Esperanta-Germana. Unua parto. Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig, 25x17 cm, XXIV + 155 p.

La apero de tiu ĉi verko estas jam menciita tie ĉi. Ĉiun, ankaŭ tiun kiu ne konsentas al la lingvistikaj principoj de la aŭtoro, surprizos la giganta amplekso de tiu ĉi ellaboritaĵo Ĝis nun tute ne ekzistas simila verko. Per apenaŭ superbla zorgemo kaj sciencemo la aŭtoro mencias, analizas, klarigas, derivigas, komentas ĉiun opan esprimon per arego da teorioj kaj praktikaj aldonoj. La libro, kiu reprezentas nur la unuan volumon de verko, aperonta en pluj daŭrigoj, enhavas ĉiujn vulgarnajn kaj klerajn esprimojn, sciencajn vortojn, esprimojn botanikajn, zoologiajn, teknikajn kaj trovitajn en Esperanto. Tiel ekzemple la klarigo pri „akvo“ kun ĉiuj derivaĵoj kaj parencaj esprimoj okupas pli ol 200 liniojn. Per arego da specialaj referencosignoj ĉiu vorto estas speciale klasigita, ankaŭ tio vidigas la nealtingite sciencajn laboron de la verkinto. Diversaj neologismoj kaj kelkaj ne ĝenerale aplikitaj principoj lingvistikaj neniel influas tiun meritan laboraĵon. Bedaŭrinde la verko ekaperis en tempo de plej akraj ekonomiaj cirkonstancoj. Estas evidente, ke la prezo de tia verko estas pli alta ol tiu de ĝeneralaĵaj eldonoj, konforme al la grandegaj elspezoj por la eldono, sed tio tamen ne malhelpas la akiron al ĉiu serioza Esperantisto. La apero de plujaj volumoj dependas de la sukceso de la unua. La dua kaj tria volumoj jam estas en preparo. La eldonistoj tamen informas, ke konsiderante la ĝeneralan malbonan ekonomian situation ili povas akcepti antaŭmendojn nur, se al la antaŭmendo estu aldonataj tuj po 5 dolaroj al egalvaloro en alia bona valuto.

La eldonistoj bezonas almenaŭ 500 antaŭmendojn. Alie la sekvontaj volumoj nun ne aperos.

Do ne sufiĉas gratuli la aŭtoron kaj la eldonistojn pro la aperigo de tia gravega verko, sed estas necese akceli la aperon de la plujaj volumoj per multombra mendo. Tio signifas rekomenci la modelan laboron kaj progresigi la praktikan Esperanto-movadon.

R. Kr.
Benemann, Esperanto-Handwörterbuch, I Teil: Esperanto-Deutsch, Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Abteilung, Leipzig, 1923, XVI + 160 p. 12x17 cm, tre bele bindita.

Prezentigas al ni en alloga aranĝo serioza kaj diligenta laboro de sperta kaj multjara Esperantisto. Kio mirigas la uzanton de la libro, tio estas la relative ampleksa enhavo de la libro kaj la kvalito. Diference al aliaj vortaristoj kaj laŭ mia opinio tre irafe la verkinto flankenlasis ĝenerale ĉiujn dubajn kaj superflujajn esprimojn. La aldono de granda parto da teknikaj terminoj zorge elektitaj laŭ lingva valoro kaj necese pligrandigas la valoron de la vortaro. Specialaj referencosignoj atentigas pri la kategorio de la koncerna vorto. Uzataj neologismoj estas averte signitaj per „r“. Evidente ĉiu verko havas personan karakteron. Mi opinias eĉ, ke ĝuste en tio konsistas la valoro de ĉiu serioza laboro. Tial ankaŭ tiu ĉi vortaro enhavas kelkajn vortojn kaj formojn tute superflujajn: „darfi“ kaj aliaj. Ĉiukaze tamen s-o Benemann evitis la mension de malbonaj formoj apud la bonaj, kiel lastatempe faris tre meritinta vortaristo, tiel kaŭzante malhelpojn al komencantoj kaj pligrandigante la kelkfoje konstateblan haoson. Tio laŭ mia konvinko estas la ĉefa avantaĝo de tiu ĉi vortaro. Esperable baldaŭ aperos ankaŭ la dua parto. La Esperantistaro tiam havas denovan kaŭzon gratuli la germanajn samideanojn por ilia aktiveco en tiu ĉi sfero. Oni ankaŭ esperu, ke baldaŭ aperu tiaj vortaroj en la diversaj nacilingvoj, manko jam de longe riparota.

R. Kr.
BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj. 5-a eldono. Eldonis Bohema Esperanto Servo, Zlina ul. 44, Praha II. 28 paĝoj, 11x16 cm. Prezo 1 sv. fk.

Tre bele presita kajero. Enhavas portretojn de Esperantistoj, antaŭparolon, adresaron de Esperantistoj kaj Esp. entreprenoj, alpenigojn, registron laŭ profesio, inklino kaj fakoj.

Kompare al la antaŭaj eldonoj la nova eldono estas malpli ampleksa. Tio kredelbe estas pruvo pri seriozece de la enpresitaj nomoj de gekorespondemuloj. Oni ja prave plendas, ke multaj emas ricevi korespondadojn kaj precipe belajn poŝtkartojn, sed ne respondind ilin. Esperable la uzantoj de tiu ĉi adresaro ne havos okazon por plendo.

R. Kr.
Fabeloj de Andersen. Plena kolekto, unua parto. Tradukis D-ro L. L. Zamenhof. 132 paĝoj broŝ., 15x20 cm. Esperantista Centra Librojo, 51, rue de Clichy, Paris 9, 1923. Prezo 6 fr. fk.

Estas malnova vero, ke eĉ la plej perfektaj Esperantistoj profitas el la legado de tradukoj de nia majstro. Pro tio ankaŭ grandaj infanoj kun ĝoza legos la mondafamajn fabelojn de Andersen en tiu bonega traduko, kies aketon oni devas nepra rekomendi al ĉiuj, kiuj estas kapablaj pagi en franca valuto. La libro enhavas ĉiujn ankoraŭ ne presitajn Esperanto-tradukojn el la fabelaro de Andersen. Bedaŭrinde malaltvalutanoj ĝis tute devos rezigni pri la akiro. Estus dezirinde, ke baldaŭ ankaŭ sekvos aliaj represo.

La libro enhavas specialan averton pri la malpermeso de la reprodukto. Oni scias, ke la monopola presralto de la firmao Hachette — nun cedita al la Esp. Centra Librojo — ludis specialan ne ankoraŭ sufiĉe klaran rolon en la historio de Esperanto kaj de ĝiaj reformemaj kontraŭuloj. Esperable tiu averto ne malhelpos laojajn traktadojn pri eksterlandaj eldonoj de la verkaro de Zamenhof kaj sekve de tio, konsiderante la malfavorajn cirkonstancojn en preskaltuta Eŭropo, ne malebligis la disvastigon de la klasikaj verkoj de nia tro frue mortinta majstro en multaj landoj.

Abontarifo. GERMANUJO.

De la monato decembro la germana poŝtadministracio kalkulas la prezojn por gazetoj laŭ or-markoj. La transkalkulo en paper-markojn okazas laŭ la koncerna kurzo por la regnaj impostoj kaj dogantaksos de la pagotago.

La modifo de la ĝisnuna kalkulo fariĝis necesa, ĉar la tuta cetera ekonomia vivo intertempe aplikis la kalkulon laŭ or-markoj, kaj ĉar la gazetoj, fiksinte anticipe la abonprezon en papermarkoj, estis pleje eksponitaj al perdoj per senvalorigo. Tiuj malfacilaĵoj ja ne forigos tute per la kalkulsistemo laŭ or-markoj, sed estas grave malpligrandigataj. Pro tio ni esperas, ke ni en decembro ne bezonos postuli postpagon.

La abonprezo por decembro estas 1 or-marko.

Rekte sendataj unuopaj numeroj kostas 0.50 or-markon plus sendkoston.

Anoncetoj kostas por abonantoj 1.50 or-markojn, por ne-abonantoj 2.40 or-markojn.

POLUJO.

La katastrofa falo de la pola marko devigas nin fiksi ĝis plue la prezon por polaj abonantoj je egalvaloro de 0.20 sv. fk. po numero.

Krome ni estas devigitaj provizore limigi la antaŭmendojn ĝis maksimume 10 numeroj. Ni esperas, ke ni povos kiel eble plej baldaŭ ŝanĝi tiun ĉi kondiĉon. Por pagoj en bona valuto (sv. fk. aŭ dolaroj ktp.) tiu ĉi kondiĉo ne estas aplikata.

SE ĉiu abonanto varbos unu novan abonanton, ET povos ĉiam aperi 10-paĝa.

Alvoko al germanaj instruistoj-Esperantistoj.

Gekolegaj!
La germana Esperanto instruistaro decidis esti membro de la Edukista Internacio. Konstrui la novan lernejon kaj pli altigi socie kaj materie nian profesion, tio nun estas la plej eminenta tasko de la tutmonda instruistaro.
Grandiozaj nur progresas per bone redaktata ĉie legata internacia fakgazeto. Tial, kolegoj, legu kaj disvastigu ĉiuj la internacian pedagogian fakgazeton „Novaj tempoj“

kaj same la infangazeton „Internacia junularo“. Famaĵ pedagogoj laboras en ambaŭ redakciejoj kaj garantias, ke ili estas progresemaj organoj.

La Saksia Instr. Asocio nun tradukas la kulturologian (Kulturkunde) de Klemm. Eble estus pripensinda tasko por la membroj de la germana asocio aŭ por membro de ĝi, traduki modernan historian verkon, ekz. la optikajn tabelojn (Synoptische Tabellen) de Kauerŭ. Kolegoj, per sincera laboro ni konservos kaj firmigos la bonan famon de la germana instruistaro en la tuta mondo.

La kolegoj pritraktu en la labor-unuiĝoj la demandojn, ĉu proksimume dijara membreco al laborunuiĝo de Esp. geinstruistoj estu semelvara al ekzameno antaŭ ekzamena komisiono.

Nia pekskribo al la Regna Ministerio de Internaj Aferoj (Reichsministerium des Innern) por enkonduko de Esp. en la lernejoj jam poris fruktojn. La Prusa Ministerio por Arto, Scienco kaj Popolklergado per enketo kolektas la nomojn de la geinstruistoj kapeblaj instrui Esperanton.

Kolegoj, sendu regule findajn raportojn. Klopodu varbi por ni la distrikajn instruistajn unuiĝojn kaj la gepatrajn konsilantarojn. Materialo laŭeble estos volonte sendata, oratoroj nomataj.

Instigu ĉiujn Esp. kolegojn, aliĝi al nia asocio. Fortigu la kazon! La membrokotoĵo de la 1. julio estu sendatataj pokvaronjare. La kotizo ĉiujfoje egalas al la kvaroblo de la ĵusa afranko de simpla letero. Libervolaj donecoj estas tre dezirataj. Varbu diligente!

Kun kolegaj salutoj
Asocio de Germanaj Instruistoj Esperantistoj
A. Sohrmann, Weinböhla, prezidanto.

Helpu al la germanaj infanoj!

Jam en numero 167 de ET ni publikigis alvokon pri helpo al germanaj infanoj. Dume ni ricevis de plej diversaj flankoj proponojn pri arango de kolektoj. Bedaŭrinde manko de loko ne ebligas al ni represi ĉiujn faktojn, ĉie kaj ĉiam ripetigantaj. Infanoj suferas!! Tiu ĉi ve-krio sole sufiĉas al homamikoj por fari la necesan. La teruraj postsekvoj de la mondmitilo kaj la ĉiam pli kaj pli akriĝantaj ekonomiaj cirkonstancoj en Germanujo igas apenaŭ toleraĉla la vivon al plenkreskuloj. Des pli suferas malfortaj infanoj senkulpaĵ.

Rememoru pri ili okaze de la kristifesto kaj lasu al ili iom de via abundeco!

Ni publikigas ĉi tie kun speciala rekomendo la adresojn de grupoj, kiuj prenas sur sin la taskon zorgi pri la disdono en sia regiono resp. urbo.

Oni sendu monon kaj aliajn aferojn dankeme akceptatajn al:

S-o Arthur Sohrmann, instruisto, Kronprinzenstrasse 5, Weinböhla-Dresden por la asocio de germanaj instruistoj Esperantistoj.

F-ino M. Vitzthum, vid. UEA, Floriangasse 24, Bad Reichenhall, Bavarujo por la Esperanto Grupo de Bad Reichenhall.

Negocaj informoj.

Ni atentigas niajn legantojn pri la anonco de la Esperanto-Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig sur paĝo 4 kaj rilatas ankoraŭ al la recenzoj sub la rubriko „Bibliografio“.

Kristnasko alproksimigas!!
Donacu bonajn Esperantajn librojn!!
sv. fk. aŭ egalvaloro

Wisemann, Fahiola	5.-
Seldel, Vintro Fabeloj	1.50
Hebbel, Gyges kaj lia ringo	2.-
Ramo, En Svislando	2.50
Goethe, Hermano kaj Doroteo	1.20
Thurston, La urbo de belega sensencaĵo	2.-
Bulthuis, Mal ica en spirito	1.-
Bulthuis, Taglibro de Vilagpedelo	0.75
Oberroman-jung, La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	1.20
Rieck, Oni Ridas	1.-
BES-a Adresaro (por kolektantoj)	1.-

Ni liveras nur post antaŭa pago. Por afranko aldonu 10%. Por germanoj la prezoj estas fundamentaj prezoj multoblogetaj per la valida ŝlosilnumero.

Butin & Jung, G. m. b. H.
Esperanto-Eldonejo,
Godesberg (German.), Bahnhofstr. 30.
Postŝteka Konto Köln 92056.

Arta Kristnaska Donaco!
Esperantajo! Malmultkosta!

Hungara vilaĝo brodas por tablomezo kun verda siele inter floroj! Delikata propagando ne alirada. Ornamo de ĉiu ĉambro! Prezo sv. fk. 10.- aŭ egalvaloro. Mendebla per

P. Balkányi, Budapeŝt, VI., Hajos-u. 15, Hungari.

Jus aperis
„La Reĝo Judea“
Dramo en 4 aktoj kaj 5 bildoj. El rusa lingvo traduitus V. Deviatin. Esperantan tekston trarigardis magistro de teologio kaj akademiano prof. A. Dombrovski. — Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. Dura eldono, 182 paĝ. 13x18 cm. Prezo broŝ. 2.25 sv. fk., bind. 2.75 sv. fk. plus 0.50 sv. fk. sendkosto. Por revendistoj rabato.

„La Reĝo Judea“ estas verkita de anojima, lamen tre konata, eminenta rusa poeto, sin kasantia sub litero „K. R.“ La verko estis ludita en Rusujo, en la imperiestral teatroj antaŭmultaj. — Ĝi estas tradukita en sep lingvoj. — La eldonoj, presita en Dresden (Wihl. Limpert) havas elegantan eksteron kaj estas sen preseraroj.

Mendu ĉe la eldoninto
P. Medem, Kaunas
Smeliu g. 12 (Litov.)

Koncertpianistino Irene Mochnacki

Instruas — nur konscience — plene laŭ la metodo Leschetizky en sia logejoj aŭ ĉe la lernantoj. Malbona kutimoj de la mantenenda estas precipe zorge korektataj. Paga al la instruistino po Kr. 20.000.— por unu horo.

Wien, III., Fasangasse 32-II-11, Austr.

ĈU VI DEZIRAS LEGI ?
la en ET jam aperintajn literaturajojn

★
Mendu tuj „Bukedo“
1-a volumo. Prezo po 1.— sv. fk.
Por abonantoj 3 ET-numeroj.

Eldonejo Esperanto Triumfonta, Horrem b. Köln.

Ĉiu posedanto de Faŭsto nepre bezonas la koncizan

Komentario al Fausto
verkita de Max Butin, L. K.
Prezo: 50 sv. centimoj aŭ 50 gmk. x ŝlosilnumero.

Eldonita kaj havebla ĉe
Butin & Jung G.m.b.H., Godesberg
(Germanlando) Bahnhofstr. 50.
Postŝteka Konto: Köln 92056.

Anoncetoj.

FIANĈIĜO. F-ino Irosimka P. lieva kaj F-ino Velin M. Milev, Esperantistino en Sofia, fianĉiĝis. [1]

PROFESORA KURSO EN MISKOLCZ, HUNGARUJO. La 5 novembro komenciĝis kurso por geprofesoroj sub gvidado de prof. Kőnig Lajos. Ĉi tiu estas la unua okazo, ke geprofesoroj amase lernas nian lingvon en Hungarujo. Partoprenas la kurson pli ol 20 geprofesoroj de 8 mezgradaj lernejoj. Car ili tre ŝatus post kelkaj semajnoj intertraliĝi kun ĉiulandaj kolegoj, ni petas ĉiujn geprofesorojn kaj geinstruistojn ĉiufakajn, ke ili skribu kiel eble grandnombre al la kursgvidanto. Adreso: Kolozsvari strato 8, Miskolcz, Hungarujo. Ĉiu skribonto ricevos respondon. [2]

KIU SAMIDEANO PRUNTEDONUS al germana samideano 15-20 dolarojn aŭ egalvaloron por elmigri. Repago okazos post aŭ intertempe de duona jaro, plus 20% Propozonon bonvolu sendi al: S-o Walter Strenger, Zuffenhausen-Stuttgart, Königstr. 22, Württemberg (Germanlando). [2]

EDZIĜOPETO. Gesamideanoj diskonigu tion! Franco. fraŭlo 36-jara, havanta bonan melion kaj monon por fondi komercon, deziras korespondi kun fraŭlino aŭ vidvino, prefere hebreaŭ el Orienta Eŭropo. Propono tre serioza. Ne timu skribi Skribu Esperante aŭ france al s-o Geblanc, 101, avenue de Californie, Nice, Francujo. [2]

INFORMO. S-o Cosutta en Braila (komp. Parolejo 210) informas nin por justeco, ke li dume ricevis respondon de f-ino M. Rihova en Nusle, kiun la poŝtajfoj laŭŝajne ne atingis pro manko de la poŝto. [1]

KIU SCIAS IOM PRI ADRESO aŭ sorto de rusa Esperantisto Tiliĉev Georĝij Dmitrijeviĉ, bonvolu skribi al la frato M. D. Tiliĉev, Moskva, Oŝojenska, 2 j Ijinskij, 15, kv. n. 1, Rusujo. Al personoj, sciigantaj ion pri Georĝio Tiliĉev, ĉiuj elspeszoj estas rekomencotaj laidezure, ĉu mone, ĉu per libroj, poŝtmarkoj ktp. [2]

FILATELISTOJ. Kontraŭ mendepono mi vendas nur unuaklasajn pm. de ĉiuj landoj. Malnovgermanujo, Eŭropo, Transmaro, kolonioj, maloftajfoj, novaĵoj ktp. je senkonkurencaj prezoj laŭ katalogo de Yvert Tellier. Filatelejo E. Gabelmann, Katharinenstr. 14, Freiburg i. Br., Germ. [1]

BULGARAJ POŝTMARKOJ. Boris P. Kavalgiev, s. Rjajhovo-Rusensko, Bulgarujo, vendas ĉiujn bulgarajn pm. en kompletaj serioj aŭ laŭ mankolistoj: la pm. estas aŭtentikaj kaj perfektaj ekz., prezoj favoraj, prezaro senpage. Korespondas Esperante, france, angle, germane kaj ruse. Filatelisto, kiuj represos ĉi tiun anoncon en sia landa filatelisto gazeto, es'as rekomencotaj per bulg. serioj. [1]

BONVALUTLANDANOJ. Mi vendas s-ron (ĉ. 200) de flagetoj (7x5 cm) sur silko, de ĉiuj landoj, kolonioj, provincoj kaj ĉefaj urboj. Lewandowski, Lwów, Polujo, Raĥozy 5. [1]

INTERSANGANTOJ ATENTU! Laŭ ĉiu foto mi fabrikas belege koloritajn Esperanto-glumarkojn, montrantaj vian portreton, nomon kaj adreson. Uzeblaj por fermi leterojn, beligi leterpaperojn aŭ por intersanĝo. La foto estas nedifektite resendata. Prezo: por 12 ekz. 1.20 sv. fk., 36 ekz. 2.50 sv. fk. aŭ egalvaloro. Franz Christoph, Wien V, Getreidemarkt 15. [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Seriozulo deziras korespondi kun samcelanoj pri spiritismo kaj la pli alta penso, Orientuloj kaj azuloj preferatej. Mi ne respondos al filatelistoj. R. Carman, 62, Malvern Road, Dalston, London E. 8, Anglujo. [2]

S-o Petr Colov, Vidin (Bulgar.) 22-jara, deziras korespondi kun gesamideanoj per l. kaj il. pk. [2]

S-o M. Dembinski, Lodz, Zachodnia 66, Polujo deziras korespondi kun progresintaj (lingve) gepeserantistoj ĉiulandaj per il. pk. kaj l. [2]

Interŝanĝas pm. k. ĉ. l. laŭ Michel 1925. Donas: rusajn, ukrainajn, danzigajn, palestinajn kaj maloftajn polojn. Ne sendas unue. Nepre respondas. Samuel Gelrud, Hozsca pow. Rowne (Polujo). [2]

S-o C. M. Stevens, Schiessstraat 45, den Haag (Nederlando) deziras korespondadi kaj intersanĝi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk. ktp. [2]

S-o Maurice Baeyens, instruisita studento, ŝtata instruista lernejo, Ledeganckstraat 8, Gent (Belgiujo) korespondas kun la tuta mondo per pk., pm. kaj l. [2]

S-o Michel Bevernaege, 28 Grand' Place, presisto, Audenaerde (Belgiujo) deziras korespondi per pk. kaj pm. [2]

S-o Viktoro De Merlier, instruisita studento, Ledeganckstraat 8, Gent (Belgiujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per pk. kaj pm. [2]

S-o L. Supovar, Moskva, Rusujo, Stoleschnikov per 7 kv. 9, korespondas kun gesamideanoj tutmonde, interesigas pri arto, lastaj atingoj de scienco-tekniko-hemio kaj pri laboristaj organizadoj. Kolektas poŝtmarkojn, intersanĝas rusajn pm. Korespondas per il. pk. kaj l. [2]

Fraŭlo 18 jara, A. Abramov, Rusujo, Moskva gub., urbo Serpuhov, Vokzalnaia 29, deziras korespondi kun seriozaj amatoj de fotografado, prefere kun ne-komencantoj kaj samaĝuloj. [2]

Filatelisto! Por 2 sviz. fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölpnitz I. Vogtl., Bergstr. 5, [2]

Filatelisto! Mi deziras intersanĝi pm. kun svedoj, norvegoj, danoj, angoj, nederlandanoj, francoj, ĉeĥoslovakoj, hispanoj, portugaloj kaj italoj. Kontraŭ kvanto da nedifektitaj pm. mi sendas saman kvanton da finlandaj pm. Adreso: s-o Emil Malinen, Suojarvi as., Suvilahki, Finlando. [1]

S-o Bazilo Averin, Asiraĥan, poŝkestisto 14, Rusujo, deziras intersanĝi pm. papermojn (germ. nur depost 1923) kaj il. kartojn. Kontraŭ bele, plej nova modjurnalo (vira aŭ virina) sendita rekomendite, mi sendas 20-30 diversajn sov. pm. Mi petas sendi rekomendite kaj forte pakite. Mi ĉiam respondas. [1]

Fraŭlo E. Seghers, Deurnestraat 37, Oude-God, Antwerpen, Belgiujo, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun eksterlandaj geoficistoj. [1]

S-o Asen Grigorov, Sofio, bulv. Eol-Georgiev 96, Bulg., deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri astronomio, vegetarismo kaj similaj temoj. [1]

S-o Viktor Ruuse en Tallinn, S. Pärnu m. 16-2, Estonio, deziras intersanĝi monon kaj pk. il. (bfl.) kun la tuta mondo. [1]

Sergei Stessel, Simeonstr. 21-1, Reval, Estnio, korespondas intersanĝas per pk. il. kaj l. kaj pm. Respondas ĉiam. [1]

K-do N. Nodenov, Moskva, B. Uspenskij per d. n. 12, kv. N. 5, Rusujo, deziras korespondi kun gelaboristoj ĉe poŝto, telegrafo, telefono kaj radio pri poŝtaj kaj profesiaj aferoj kaj ankaŭ pri vivkulturo. Interŝanĝas per fotografado (sed neniam per poŝtmarkoj, papermonoj ktp.). Mi interesigas pri salajroj, kondiĉoj de la laboro, profesiaj unuiĝoj kaj kulturkierligarbo. [1]

S-o Aleksandro Tschilov, Petrograd, Znamenskaj ulica, N. 40, Rusujo, deziras korespondadi Esperanton kaj angle kun ĉiulandaj sinjoroj, precipe kun ekster-eŭropaj, pri ĉiuj temoj. [1]

Du fraŭlinoj-fraŭlinoj el Rusujo deziras korespondadi pri diversaj aferoj kun eksterlandaj Esperantistoj-fraŭlinoj. F-inoj Heleno kaj Zinaida Kurdukov, B. Dmitrovska, N. 12, Moskva Klubo Esperantista, Moskva, Rusujo. [1]

Fraŭlo Jaime Navarra, Calabria 224, Barcelona, Hispanujo, deziras korespondadi per pm., pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. [1]

F-ino Rutte Holmberg, Veŝkra Kattarp, Malmö 7, Svedujo, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj per il. pk. [1]

Eugen Wüster.
Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana.
La unua parto ĵus aperis (Literoj A-C)
Prezo: 14.— gmk. (x ŝlosilnumero) = sviz. fk. 17.50; hol. guld. 8.—; ŝil. 14.—; kĉ. 105.— ktp.

ANTAŬMENDO
de la dua kaj tria partoj nur povas esti akceptataj, se ili estas akompanataj de 5\$ aŭ samvaloro en alia nacia monunujo.

La altegaj preskostoĵ kaŭzitaĵ de la malbonega ekonomia ŝtato de Germanlando devigas nin je nuligo de niaj antaŭe sciigitaj liverkondiĉoj rilate la pagon de 1 aŭ 2 \$.

La presado nur povas esti daŭrigata, se alvenos almenaŭ 500 antaŭmendoj.

Mendu senprokraste, se vi deziras la daŭrigan de tiu plej grava el ĉiuj vortaroj!

Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Meyer's Handlexikon
oka eldono, komplete reprilaborita ita kaj plimultigita.

75.000 gvidvortoj kaj referencoj kun 2000 ilustraĵoj sur 1632 paĝ. da teksto, 7 koloritaj, 45 nigraj tabeloj kaj tabel-listoj, 8 koloritaj kaj 37 nigraj land-kartoj, 24 resumoj tekstaj kaj statistikaj.

Unu volumo tute bind. mk. 15.— x ŝlosilnumero; eksterlande sv. fk. 15.—; duonlede bind. mk. 18.— x ŝlosilnumero. Eldonejo de Bibliographisches Institut, Leipzig.

Por Distrado.

Eĉ plej nigran noktitan nubon
Fine fendos taga lumo.

La dudimensia spaco.

En la pasinta jaro mi observis tra mia kvarcola teleskopo la planedon Saturno. Ĝia ringo estis malaperinta. Antaŭ kelkaj tagoj mi vidis ĝin kiel lumigantan linion, kiu dividis la stelon je du partoj; hodiaŭ ĝi ne estis videbla. Ĉiufoje, kiam la Suno, la Tero kaj la ringo estas lokataj en la sama ebenaĵo, la ringo malaperas. La fenomeno ripetigas regule post periodo de 14 $\frac{1}{2}$ jaroj. Mi konkludis el tio, ke la ebenaĵo de la ringo devas esti tiel maldika, ke mi ĝin imagas dudimensia regiono; ĉar tia dudimensia spaco sendube ekzistas en la mondo.

Kiaforma eble estas la dudimensia spaco? Ni memoru, ke la geometra punkto ne havas dimension; la geometra linio posedas nur unu dimension, la longecon; la ebenaĵo, kiu estas la dudimensia spaco, posedas longecon kaj larĝecon; la korpo havas tri dimensiojn: longon, larĝon kaj altan. La linio havas kiel limon la sendimensian punkton, la ebenaĵo la unudimensian linion, la tridimensia korpo la dudimensian ebenaĵon; sekve la korpo estas la limo de kvardimensiaj estaĵoj? Ni ĝin ne scias, ni dubas eĉ pri ilia ekzisto. Ni atingis la limon de niaj kapabloj. Ĉu ni povas fari al ni imagon, kia kaj kio estas la esenco de la Röntgen-radioj, de la elektraj ondoj, kiujn ni uzas en la senfadena telegrafado? Ne; ni simple metis la efikon sur la lokon de la kaŭzo, kaj kie mankas la kompreneco, tie ni trovas tuj vorton, kiu ĝin anstataŭas.

Koncerne la dudimensian spacon mi nepre volis scii, kia estas la vivo en tia eksterordinara mondo. Mi volis fari servon al la homaro per klarigo de tiu problemo, eĉ se mia vivo estus en danĝero. Pro tio mi decidis peti la konatan hipnotiston D-ron N., ke li sendu mian spiriton al la ringo de la planedo Saturno. La doktoro plenumis mian peton kun granda plezuro — kiamaniere, tio estas lia sekreto —, kaj mi, aŭ pli ĝuste mia spirito, flugas sur lumradio al la celo. Pardonu, ne estis eble uzi alian veturilon, ĉar ĝis nun tia ankoraŭ ne ekzistas. Mi flugis je granda rapideco farante 300 000 kilometrojn posekunde. La distanco inter Tero kaj Saturno estas 1400 milionoj da kilometroj; laŭ kalkule mi do atingos proksimume post unu horo la deziratan lokon.

La ringo estas grandega ebenaĵo, kaj mia spirito ŝajnis sur ĝi malgrandega ombro. La ombro de la homo imitas ĉiun lian movon; ĝi do estas perfekta dudimensia aĵo. Ĝi havas nur longon kaj larĝon, la tria dimensio tute mankas al ĝi.

Malproksime mi ekvidis saturnan homon. Irante renkonte al li, mi miregis, ĉar anstataŭ rekte proksimiĝi al li, mi iris pli kaj pli alten, tiel ke mi fine staris super lia kapo. Kiel okazis tio?

Tre simpla okazo. Ne mia persono, nur mia spirito (kvazaŭ ombro) troviĝas sur la ringo. Spirito havas nek korpon nek pezon. Ni teranoj, kiuj devas porti niajn proprajn, kelkfoje sufiĉe dikajn korpojn sur la Tero, ni devas kvazaŭ mal-

supreniri sur la ringon de Saturno, kiam ni intencas iri rekte antaŭen. Feliciĝaj loĝantoj de la ringo, viaj scienculoj — supoze ke tiaj ekzistas inter vi — ne penas studadi, kiel formiĝas la tradicanta efiko de la peza forto, aŭ solvi la problemon de tri korpoj, kiun eĉ ni teranoj ne scias solvi.

Starante antaŭ la saturnano mi deziris paroli kun li, sed per kia lingvo? Malfacila tasko. Sed mi memoris, ke ankaŭ sur la Tero mi partoprenis foje kunvenon de surdamutuloj.

Oni aranĝas malgrandan pantomimon nur per signoj. Ekzemple, oni metas la dekstran manon sur la koron, aŭ sur la malsupran parton de l' orelo (orelringo signifas virinon), karesas sian supran lipon (barbo signifas viron), blovas sur la fingron (estingiĝi, morti), imitas la manĝadon ktp. Tio estas vere universala komunikilo, kaj mi tuj provis ĝin uzli. Je mia plej granda miro la saturnano ne nur komprenis miajn signojn, sed tuj respondis per similaj gestoj, kaj inter ni ebligis komunikadon.

„De kie vi venis?“ li demandis.

„De la Tero.“

„Kio estas la Tero?“

„Simila planedo kiel via Saturno.“ Mi estis montranta la direkton, de kie mi venis, sed neeble — mi ne povis movi miajn brakojn dekstren aŭ maldekstren, sed nur laŭ la ebenaĵo, en kiu mi estis. En la dudimensia spaco ĉio fariĝas en unu sola ebenaĵo. Ankaŭ la vidado kaj la movado estas eblaj nur en tia sola ebenaĵo, kaj por tiuj estuloj ne ekzistas rimedo sciigi iun el la tridimensia spaco. Ĉu ni terloĝantoj ne estas en la sama situacio koncerne la kvaran dimension?

Por la okuloj de tiaj estaĵoj la bildoj estas liniaj, malgraŭ la dudimensia spaco, en kiu ili vivas; la bildoj sur la retino de ni terloĝantoj estas nur dudimensiaj, kvankam ni vivas en tridimensia spaco. Kial la retino de la estaĵoj en la kvardimensia spaco ne estas tridimensia?

„Vi kredas je tia tria dimensio?“ demandis la saturnano. „Kiel vi povas kredi tian malsaĝaĵon? Montru al mi tian trian dimension! Kie ĝi estas?“

„Sinjoro, mi venis el tia tria, mi vivis en tia spaco.“

Nun li miris. Poste li daŭrigis (kredible li pensis ke mi estas trompulo):

„Ni atendas hodiaŭ la revenon de la scienca societo, kiu antaŭ du jaroj (la jaro sur Saturno daŭras pli ol 29 terjarojn) estis forsendita ĉirkaŭiri la mondon, por fini la kontraŭdiron pri la tridimensia spaco. Komilito kun centoj da homoj eliris serĉi tian trian spacon, kaj hodiaŭ revenis jam du antaŭirantoj kun la informo, ke ili proksimiĝas. — Jen! ili jam venas. Rigardu tien!“

Mi rigardis en la montritan regionon, sed mi ekvidis nur unu personon. Kie estas la aliaj, la centoj? Jen, rigardu! El la unu homo, kiun mi ĝis nun vidis, eliĝis nun unu homo post la alia. Neeble! Ili venis kvazaŭ laŭ irado de anseroj unu post la alia el tiu unu homo.

Tio nur estas ebla en la dudimensia spaco.

Mil ombroj, meitaj unu sur la alian, restas tamen unu ombro; tiamaniere mil loĝantoj de saturna ringo bezonas ne pli grandan spacon ol unu, kaj ili povas eliri el tiu spaco, kiom ajn ili estas.

Poste kuniĝis granda amaso de la loĝantoj, kaj unu inter ili, kredoble la estro de tiu popolo,

dorlota por li, sed neforigebla, neŝanĝebla, longedaŭra same kiel la virino mem.

Kion do faras la virino antaŭ la spegulo?

Oni ne devas ja pensi ĉiam malice: Evo, kiu spegulis sin en la rivereto, estis perfekte senkulpa. Antaŭ ĉio, la virino, spegulante sin, havigas al si ĝojon iniman kaj perfektan: ŝi eĉ povas admiri alian belan estaĵon senjaluzie; la afero ne estas alivorte tiel facila kaj ofta. Pli la spegulo havas, por tiel diri, ian inteligenton; kutime ĝi plibeligas tiun, kiu sin rigardas en ĝi, el kie jen la kontentiĝo estas duobla.

Fine, la virino antaŭ la spegulo elernas sian arton; arto pri sia ornamado, per kiu ŝi favoras, kompletigas, plibeligas la naturon; kaj per praktikado de tiu ĉi arto, la gusto vere rafiniĝas, tiel, ke oni eĉ povas diri, ke la spegulo estas ifo por homa kaj civiliza progreso. Kiu kuraĝas aserti, ke la spegulo kolektigas la virinojn? Komprenie virino saĝa ne pasigas la tujan tagon antaŭ la komplezema amiko; sed kiam ŝi tie residas, ŝi eble rimarkas en sia bildo ne nur la trejturecon kaj la haŭtilankegecon, sed ankaŭ la plenesprimon de l' vizaĝo lumigata per la okuloj. Iufoje ŝi povas rimarki, ke la veran belecon ne donas nur la trajtoj kaj la koloro, sed ĝi devenas de intima forto, kiu ne anstataŭas la arto de l' ornamo. Ĉiam ŝi, pripensante tiun iniman fonton, retrovas ĝin en sia animo. Evo, spegulante sin en la rivereto, havas sian naŭvan animon reflektita en la okuloj, en la rideto, en la koloro de l' karno, kaj ŝi vidis sin tre bela, kiel povas sin vidi ĉiuj virinoj rigardante sin intime kaj spirite en la spegulo.

El la itala revuo „Scena Illustrata“ trad. F. Cesarini.

Liter-enigma.

1. Hecinberg, 2. Marmestad, 3. Ervehla, 4. Ranevo, 5. Hecinesa, 6. Holstiornu, 7. Ogratrana, 8. Dommurna, 9. Giaskana.

La naŭ vortoj ĉi-supraj enhavas la literojn de po unu urbno. Se oni ĝuste interŝanĝas la literojn, rezultos urboj en: 1. Anglujo, 2. Nederlando, 3. Francujo, 4. Italujo, 5. Germanujo, 6. Svisujo, 7. Hispanujo, 8. Afriko, 9. Japanujo. — La komencaj literoj de ĉiuj naŭ urbnojn, legataj de supre malsupren, nomos urbon en Usono.

(Solvaj en ET n-ro 171.)

sciigis la rezulton de la forsendita scienca komitato, sciuj:

„La spaco en la tuta mondo havas nur du dimensiojn, ĉar la elsendita komitato sur sia longa vojo nenie trovis alian ol dudimensian spacon; plie: la spaco en la mondo estas senfina, ĉar konstante antaŭen irante ili ne trovis finon.“

La ideo „senfinesco“ ne faras al vi saturnanojn grandan penadon. Sed mi devas konstati, ke vi estas tiel konsekvencaj kiel la scienculoj sur la Tero, kiuj ankaŭ certigas, ke la kvardimensia spaco ne ekzistas, ĉar ili ĝin nenie trovis.

Tie ĉi, en la dudimensia spaco, oni nur vidas laŭ unu ebenaĵo, kies limo estas linio. Oni observas lumantajn punktojn sur tiu linio; ili aperas jen unu post alia, jen multnombraj sur la limigita linio. La aspekto sendube estas belegra precipe en nokto; ĝi estas vera fajroludo. La steloj, la planedoj, la suno, la lunoj de Saturno, kiam ili trapasas la ebenaĵon de la ringo, lumigas la limlinion dum pli aŭ malpli longa tempo en tiu mondo. La tempo de mia restado tie ĉi okazis post la periodo, kiam la suno ĵus pasis la ebenaĵon de la ringo, kiam la tuta limlinio brilis. Bedaŭrinde mi jam ne povis ĝui tiun majestatan vidojn sur la ringo.

Kiam mi parolis al mia konato pri tiuj fenomenoj, li diris al mi kolere: „Se vi estas tiom konvinkita pri la ekzisto de tia tria dimensio, mi kondukos vin al scienculo, kiu jam de mil jaroj serĉas tian spacon kaj neniam trovis.“

Kun miro mi demandis: „Kara sinjoro, kiom da jaroj vivas do la saturnanoj?“ La konato komence ne komprenis mian demandon, poste li sciigis al mi, ke ili neniam mortas.

„Ili neniam mortas! Kiel estas tio ebla?“ Poste mi hontis, ke mi faris tian demandon. La saturnano, ne havante korpon, ne bezonante nutraĵon, ne uzante sian korpon por laboro, nature povas vivi eterne. Li estas estaĵo kiel la ombro malantaŭ planedo, ankaŭ tiu estas eterna fenomeno, se la suno eterne lumus.

En tiu mondo regas vere paradiza vivado. Tie ĉi la reĝoj, ministroj, oficistoj vivas tre komforte; tie ĉi oni havas nek eksporton nek importon nek limdepagon; ekzistas nek militoj nek armeoj, nek malsanoj nek malsato, resume, nenio el tiuj malbonoj, kun kiuj ni teranoj tre ofte konatiĝas.

„Ĉu oni havas idojn en tiu ĉi mondo?“

Ankaŭ tio mankas.

Kiam komencos sur Tero la paradizo? demandis foje iu sur Tero. Tiam, kiam la naskiĝo ĉesos. Jen ĝi estas, tia paradizo! Sekve tie ĉi estas nekonata la familio, kiu estas la bazo de l' ŝtato; nekonata la diligenco, fervoro, penado, ĉar oni ne havas idojn, oni bezonas nenion; estas nekonata la amo, kiun priantas niaj poetoj de la mondkomenco kaj ĉesos ĝin prikanii nur ĉe la fino de l' mondo. En tia mondo, kie ekzistas nek fianĉino, nek edzino, nek amo, nek familio, mi ne volus vivi.

„Bonvolu min konduki al via scienculo, kiu jam de mil jaroj pensas pri la tridimensia spaco!“ Ĉar la novaĵo, ke estas tie ĉi homo el la tria, jam rondkuris, kaj scivolaj homoj ĉirkaŭis nin. Mi ne volas resti tie ĉi. Ne sciant rimedojn foriri el ĉi tie, mi devas serĉi la amikecon de la loĝantoj, kiel tion faris la vojaĝantoj en Afriko, sed kun la diferenco, ke mi ne estas tie ĉi en danĝero ke oni min mangos, kiel oni manĝis la vojaĝantojn en Afriko.

Farante la vojon al la scienculo ni parolis pri la tria dimensio. Mia konato certigis min, ke la tria dimensio estas la tempo, kaj nur la malspriteco de la loĝantoj kaŭzas, ke oni ne kredas ĝenerale tiun sciencan tezon. Kun malmulte da bonvolo oni povas fini la tutan disputon, akceptante tiun opinion.

Tute kiel ĉe ni sur Tero. Ankaŭ tie ĉi la homoj ne volas kompreni; se la scienculo starigas ian hipotezon, la homaro tion prenu kiel veron. Sur la Tero la malkredo al hipotezoj estis fonto de multe da progresoj kaj eltrovaĵoj, sed en tiu angulo de la mondo — sen iloj esplori la naturon — mi ne miras, ke malgraŭ la longa vivo iliaj filozofiaj pensadoj ne montris pli grandan rezulton.

Ni alvenis ĉe la scienculo. Li komencis tuj trakti sian preferatan temon. Ne sciante, ke mi venis el la tridimensia spaco, li volis min instrui, ke la tridimensia spaco vere ekzistas; nur mankas al ni la organo, la ilo, per kiu ni povus ĝin observi. Certe estas estaĵoj, kiuj disponas pri tia organo. Li mem kolektis jam delonge pruvojn pri la tria dimensio. La lumigado de la limlino venas, kiel li prave diris, el tia spaco. Foje li vidis belagan lumadon, ruĝan, flavan, bluan, violan unu post la alia. Li volis ĝin kapti, sed estis neeble, kvankam li vidis tian fenomenon eĉ pli ofte. Ni teranoj kredas, ke la ringo de Saturno konsistas el polvoj; eble la lumo de la suno rompiĝis en iu kristalo, kaj la saturnano volis kapti ĝian spektoron. Ombro ne povas kapti lumon!

„Staru kun via vizaĝo tiel, ke la okuloj estas sur la rando de via figuro! En tia direkto devas esti la tria dimensio!“ diris la scienculo. Mi spontane turnis la kapon en tian direkton kaj mi vidis — nenion.

„Mankas al ni la organo tion vidi.“ Ĉiam mankas ia organo. Li parolis plie pri la antaŭ-

Evo kaj la spegulo.

Naskiĝinte el la ripo de paĉjo Adamo, Evo tuj forkuris ĉarme kaj facilmove tra la verdaj herbejoj de Edeno, ĉirkaŭrigardante per lazuraj okuloj ĵus malfarmiaj al la lumo kaj jam avidaj je ĝojo kaj beleco. Ŝi kuradis malrapide, kaj tiu sentaŭga Adamo sekvis sin marŝante iom difekte, pro tiu ripo, kiu mankis al li.

Fine Evo haltis kun la ĉarma moveto de l' birdo, kiu post la flugado haltas sur arba branĉeto; kaj Adamo post la lametante sukcesis atingi ŝin. Evo eĉ ne spiretante kaj lametante sukcesis atingi ŝin. Evo eĉ ne turnis sian kapon por rigardi lin (de kie jen la historio miljara de la virina sendankemo), sed li mirante ekvidis, ke ŝi direktas la rigardon teren, kaj ke ĉarmaĝa rideto, sulketas sian buŝon. Adamo ankaŭ direktis la okulojn tien, kien rigardatis la virino (de kie jen la miljara historio de kien la virino mildeco), kaj li vidis ĉe la piedoj de sia ĉarma kunulino fluantran rivereton, al kies diafana kaj pura akvo ŝi atentis per ekstazaj okuloj. Tiam Adamo komprenis (de kie jen la miljara historio de l' vira saĝeco), ke jam Evo havis du kunulojn: la viron kaj la spegulon; kaj ankaŭ li antaŭsentis, ke ofte inter tiuj du la virino preferos la duan, ĉar Evo estis forkurinta de li, dum ŝi estis haltinta ridetante antaŭ la moviĝema spegulo de l' diafana akvo.

La virino estas al la spegulo konstante kaj ĉiam fidela, kaj oni ne povas same diri pri ŝia fideleco al la viro, pro tio ke la spegulo mem estas fidela kaj konstanta pli ol kia ajn vira persisto. Ĝi estas pacienca pli ol kia ajn vira tolero; ĝi estas kompleza pli ol kia ajn vira longanimeco. Kun la spegulo oni ne dusencas, oni havas nek malkonsentojn nek malpacojn. Kiam virino malkontenta pri la vizaĝo, kiu donis al ŝi Naturo, prilaboras al si alian, jen la kompleza spegulo reflektas la novan vizaĝon, forigante ĉiun signon de la malnova. La homo, kiu riverencas la renovigintan belecon, ankaŭ malice ridetas; la spegulo estas muto, sed ĝi ne konas malicon.

La spegulo konservas eterne la kvalitojn, kiujn la homo havas nur dum la mallonga periodo de la pasio kaj el l' deziro: la deziro vidi, trovi, senti ĉe la virino ĉion bela, bona, dolĉe, dia, perfekta; tial nave la viro volas konkuri kontraŭ la spegulo: tiu unua rigardo de Adamo al la rivereto estis malkaŝo de granda vero, certe ne tre

vido en la estontecon, la retrovido en la estinteccon, se ni havus specialajn organojn, funkciaj tiel rapide kiel la pensoj, ktp.

Pri tiuj aĵoj mi nur malmulton komprenis, ĉar mia kapo jam turniĝis, mi svenis, fine ekdormis. Mi ne scias, kiom da tempo daŭris tiu stato. Mi vekigis jam sur Tero.

Miajn travivaĵojn mi rakontis al vi, karaj legantoj; ĉar ni vivas en alidimensia mondo, ni ne forgesu nian karan, por ni desinitan Teron, la plej bonan loĝejon.

Otto Pilz, Timiŝoara.

Sinjoro Kapitano.

(El „Bildo el ŝonĝo“, de Ivan Cankar, fama slovena verkisto.)

Jam sufiĉe da tempo pasis, de kiam miaj ŝonĝoj, kiel ankaŭ la ŝonĝoj, de ĉiu homo, ricevis tute novan kaj apartan formon. Ne estas tio kelkfoje vagoj kaj nebuloj, kiuj sen senco kaj kaŭzo sin verŝas unu en la alian, ĝis fine ili disfluas en nenion. Tio ne estas tiuj ŝonĝoj, kiujn matene homo ekrigardas kun dormemaj okuloj kaj duone sin turnas kaj duone kolera svingas per la mano: „Diablo vin forportu, de kie li vin alportis!“ — kaj kiuj post tio komike kaj terure falas en la abismon. Ŝonĝoj, kiujn mi nun ŝonĝas, kaj Vi ŝonĝas, estas ombro de la vera realo; kaj ĝiaj formoj estas terure pli grandigitaj, ekstreme strangaj, ĉirkaŭitaj de iu nebulo kaj kurbigitaj, sed la realo tamen restas, Vi ekkonas ĝin tuj, kaj en la koro Vi sentas malĝojon.

Estis malvarma aŭtuna mateno. La nebuloj sin trenis en la valo kaj rampis laŭlonge de la krutaj randoj de l' montaro, kaj sur la supraj tuŝitaj de la radioj de l' materuĝo blankiĝis la unua neĝo, kiu falis dum la nokto. La ĉielo estis serena; ĝi ankoraŭ memoriĝis pri la nokte falinta neĝo kaj pri la malvarmaj steloj, sed ĝi jam atendis la sunon.

Mi rigardis tra la fenestro; tiam fenestron neniu jam purigis, sed mi vidis klare ĉion, kio antaŭ mi okazis; kaj ankaŭ la voĉoj en la pura matena aero etis tiel klaraj, ke mi aŭdis kaj komprenis ĉiun vorton. La korto estis surŝutita de nigra polvo, kiu dum la nokto transformiĝis je graso, densa koto; kaj same per tiu polvo estis kovritaj la malaltaj barak-egmentoj kaj velkintaj folioj de la nukstarbo, kiu tute sola staris en la mezo de l' korto; sub tiu nukstarbo soldato tenis selitan ĉevalon, kiu pro malvarmo kaj malkvieteco saltadis kaj tremis.

En longa rekta vico staris la cento destinita, jam la saman matenon foriri al la batalkampoj. Ili staris kvazaŭ ŝtonigitaj, eĉ ne unu okulo palpebrumis; la viraj korpoj fleksiĝis sub la ŝarĝo de pezaj dorsosakoj. Neniam ĝis tiam mi vidis tiom da korpa beleco. La vizaĝoj estis tiel junaj, preskaŭ infanaj, kaj ĉiuj estis freŝaj; ankaŭ iliaj okuloj brilis pro roso kaj ŝajnis deveni el malproksima regiono, el la regno de belaj ŝonĝoj; kaj ĉiuj estis senmove fiksataj sur la kapitano, kiu malrapide kaj senzorge paŝis antaŭ la cento.

La kapitano havis tre altan staturon; li superstaris je unu kapo la centon; li estis envolvita per larĝa nigra mantelo, el sub kiu elŝoviĝis la malgrasaj kruroj; per la mano, kiu en la ganto ŝajnis osta kaj konvulsie kunpremita, li tenis bastonon, sur kiu li sin apogis dum la irado. Lian vizaĝon mi ne vidis, ĉar la tutan tempon li rigardis la centon. Unu paŝon post li iris luna soldato, kiu de tempo al tempo timeme ĉirkaŭrigardis, kiel ĉirkaŭrigardas homo, kiu volus forkuri, sed sentas, ke li estas sen kompato ligita.

La kapitano denove komencis sian irarigardon. Li haltis antaŭ la unua en la vico, antaŭ alta, gracia junulo, kiu fiksas sur lin siajn nigrajn rigidajn okulojn. La kapitano haltis precize antaŭ li.

„Via nomo?“

La junulo diris sian nomon, kaj en tiu ĉi momento io frapis mian koron: nun mi vin konas, bela junulo! Vi, pensema, kun plena koro, kiu esperas je granda estonteco! Viro inter la kamaradoj, obeema knabo inter saĝaj maljunuloj! Viva branĉo sur arbo; se iu ĝin eltrancus, estus vundita ankaŭ la sama arbo!

La kapitano demandis plue:

„Ĉu vi havas patron?“

„Mi lin ne plu havas.“

„Kaj kiom da gefratoj?“

„Mi ilin ne havas.“

„Ĉu vivas almenaŭ la patrino?“

„Patrinon mi havas!“

Kaj luno ekbrilis en liaj okuloj.

La kapitano levis la bastonon kaj okulsignis al sia akompananto. Tiu eprenis el la maniko peperon kaj kun tremanta mano enskribis la nomon de la junulo. La junulo paliĝis.

La kapitano iris al la dua en la vico eĉ ne rigardante lin; li iris al la tria kaj haltis antaŭ li. Tiu estis ĝoja, parolema kaj brua junulo, konata kantisto kaj karulo de la knabinoj. Lia vizaĝo estis sana, kaj sur la ruĝaj lipoj vidiĝis rideto.

„Ĉu vi havas fianĉinon?“ demandis la kapitano.

„Jes, mi ŝin havas, sinjoro kapitano!“

La kapitano levis sian bastonon, la akompananto skribis.

Tiel la kapitano promenis malrapide antaŭen; li rigardis, demandis kaj elektis. Li preterpasis po du, po tri, eĉ ne rigardante kelkajn, kaj poste elektis per unu fojo kvin. Al mi ŝajnis, ke li intence elektis la plej fortajn kaj plej belajn.

Li venis al la fino, lasfoje levis la bastonon kaj returnis sin. Jen mi ekvidis lian vizaĝon, kaj en mia koro malvarmiĝis. Tiu ĉi vizaĝo estis sen haŭto kaj karno, anstataŭ la okuloj en la kranio estis elfositaj du profundaj kavoj, kaj longaj dentoj elstaris el la nuda, forta makzelo. La kapitano nomiĝis MORTO.

„Antaŭen... marŝ!“

La cento ekmarŝis kaj foriris per forta paŝo en la nebulon. Antaŭ ĝi rajdis la kapitano; alte super la nebulo fliris lia nigra mantelo.

El la kroata lingvo tradukis
A. Bertoli.

Kiam la luno brilas...

Originalo de Curt Balasus.

Nokto estis, varmega somera nokto. En plej profundan silenton enkovrita kuŝis la mondo. Kiel ajn vigla, laŭta kaj okupata ĝi estis dum la pasinta tago — nuntempe silente regis. Nur la larĝa riverego, kiu — preterfluante la malgrandan urbon — trarapidas la arbaron, mallaŭte murmuris. Kaj la gigantaj tre maljunaj arboj gardantaj la sekretan arbar-herbejon klinetis sin unu kontraŭ la alia kaj ili — duone jam dormante — paroletis gravajn aferojn: travivaĵojn kaj saĝaĵojn el la longa vivo. La luno ĵus aperinta ridetis pli ili; li konis siajn malnovajn amikojn kaj sciis, ke ili estas filozofoj, kiuj rigardas la vivon sen ekscitiĝo. Kiel jam ofte, li sentis grandan emon al mallonga konversacio kun ili. Rapide li supertuŝetis iliajn branĉojn per sia argenta pentrilo kaj kriis: „Ho, ho, estimataj amikoj, ĉu vi jam volas dormi? Jes, vi povas ripozi trankele, sed mi estas ankoraŭ marŝanta, malgraŭ miaj maljunaj piedoj!“

„Nu, nu, ni ankaŭ ne estas plu la plej junaj! — Sed bonan vesperon, kara amiko!“ respondis unu el la arboj. Kaj ankaŭ la aliaj kuŝis la dormon el la branĉoj kaj kapbalancis scivole kaj ĝojgite por saluti la ĉielan amikon.

„Ĉu vi scias novajon?“ demandis malrespektete malgranda pinido, kelkfoje iomete malmodesta. La voĉo sonis base, nur la lasta silabo transis la aeron klare kaj trumpetisimile — li estis en „voĉŝanĝo“, la bedaŭrindulo!

„Vi tuj silentu!“ rezonis la arbestro; la arogantulo iĝis hontante malsuprenpendi la branĉojn kaj rigardis teren. Sed la luno tolere ridetante respondis la vorton: „Lasu lin, mi petas; estis scivolaj estas ja la rajto de l' infanoj! Estas nur bedaŭrinde, ke ni maljunaj ankaŭ ne scias ĉiujn respondojn —. Kiel ofte mi ekrigardas palan homvizaĝon, en kiu estas skribitaj mil demandoj —. Sed mi ne volas revii en tiu ĉi momento! Mi devas ja prepari vian arbar-herbejon por la festo de la elfoj! Ilia belega reĝino komisiis min.“

Fervore li prenis nun sian grandan pentrilon kaj superpentris la herbejon, kiu baldaŭ brilegis kiel pompa salonego, ne, eĉ multe pli bele; ĉar ĉie estis la plej pura lumareĝo. Kaj ĉiu floro ricevis argentan kroneton ornamitan per multaj rosiadantoj. Allogite per la brilado alrapidis la insektoj — ankaŭ ornamitaj per festvestaĵoj — kaj kolektiĝis pro provi lastfoje la festhimnon.

La luno formetis la pentrilon kaj gardis sian verkon kaŝridante —

„O, ŝi ĝojos, ŝi ĝojegos — mia bela reĝino: certe, certe...“

Malsaĝeco ne esceptas la maljunulojn: la luno estis iomete enamiĝinta... tion mi diras al vi sekrete!

Nun okazis la plej mirinda mirindaĵo: la elfreĝino proksimiĝis flugpiede. Tio estis tiel bela aspekto, ke la luno kaj la arboj — eĉ la malmodesteta pinido — tute silentis. Ĉio estis nur mireganta ravado.

La elfoj dancis: ĉarmplene moviĝis la brilaj membroj, ĉirkaŭflugeitaj de silkaj vualoj. Poste ili gloregis sian reĝinon.

Severe admanante la proksima preĝejturo sonorigis la dekduan horon, kaj je la lasta sono ĉio malaperis.

La arboj spiris kelkfoje fortege. La luno ne hontis pri tio, ke argenta larvo gutetis el lia okulo.

„Kiom da kortuŝanta beleco! — Kiom da nobla ĉarmeco!“

Post kelkaj minutoj li forigis ĉiun kortuŝon kaj rememoris sian gardist-oficon.

„Nun, amiko,“ li parolis al la arboj, „dormu bone! Post tiu ĉi aspekto ne atendu ion pli belan! Dormu bone — min vokas la ofico, mi devas lumi ankoraŭ, sed tiufoje por tute alia afero. Mia koro doloras jam nun, nur pensante pri tio. — Sed dormu bone, amiko!“

La arboj diris oscedante »Bonan nokton!« kaj tuj ekdormis. —

Ĉie ekzistas nediskretaj estaĵoj. — La pinido ankaŭ diris »Bonan nokton« kaj fermis la okulojn, sed dormi li ne intencis. „Kio do okazas ankoraŭ?“ li pensis. „Nia saĝa amiko faris tiel memorindajn rimarkojn — estas do pli bone, rigardi ankoraŭ iomete!“

Ĉio silentis; nur la riverego murmuregis. — Post mallonga atendo la pinido ekvidis du homojn alvenantaj sur la mallarĝa vojetoj, kiu kondukas tra la herbejo. Estis junulo kaj junulino; ĉirkaŭpreninte unu la alian ili iretis, malrapide, tute malrapide... Palaj estis la vizaĝoj, malplenaj je sango; larĝe malfermitaj la okuloj.

„Belaj ili estas — kiel la elfoj!“ pensis la pinido kaj malfermegis la orelojn por aŭdi, kion ili parolas.

„Vi amas min, Margareto?“ ekparolis la junulo per iremanta voĉo.

„O Georgo, kia demando! Vi scias jam de longe, ke mi nur amas vin! Ke mi amegas vin per ĉiuj fortoj de mia koro!“ estis la respondo de la junulino. —

Tiam ŝi levis la kapon kaj rigardis profunde en la okulojn de la amato:

„Kie vi restos, ankaŭ mi restados; kien vi iros, ankaŭ mi konduku la vojo; kie vi mortos, tie mi mortos ankaŭ kaj tie mi volas esti enterigata!“

Ili ne iris plu; ili ne parolis plu; ili ĉirkaŭprenis sin reciproke pli forte.

Ardegal kisoj oniĝis de lipo al lipo, kaj la okuloj brulegis el post la duone fermitaj palpebroj. — Varmegaj iremoj transebris iliajn unuigitajn korpojn.

Kaj la pinido aŭskultegis. „Ĉu ili vere estas feliĉaj? Ŝajnas ja al mi, ke la junulino ploras?“

Jes, la junulino ploris fortege.

„Kial ni devas morti?! Kial ni estas tiel malfeliĉaj, ni, kiuj neniam faris malbonon?“ ŝi ekkriis.

„O, amatino,“ lacege sonis la voĉo de la junulo, „kiel vi pezigas mian koron! Sed diru, ĉu mi kaŭzis nian malfeliĉon, mian brustmalsanon? Ĉu mi ne provis ĉion eblan por resaniĝi? Sed ĉio, ĉio ne helpis; nur la malespero restas al mi, nur la morto, por mallongiĝi miajn dolorojn.“

„O jes, plej kara, mi ja kredas vin, vi neniel kaŭzis nian malfeliĉon. — Kaj tamen, la vivo estas tiel bela — vidu nur ĉirkaŭen: kia nokta silenta beleco — o kial, kial nur ni, —“ kaj kriante:

„O luno, ĉiela amiko, kiu ofte konsolis min, kial, kial ni devas forlasi tiel junaj la teron?! — O Dio en ĉielo, havu kompaton! Kompaton pri ni! Neniam ni faris ion malbonan, ĉiam mi laboris sen ripozo, ĉiam esperante la resaniĝon de mia amato. Ĉiam mi esperis je vi, Ĉiopotenculo, kaj nun, ne forlasu nin, kompaton, kompaton!“

Siaj brakoj etendiĝis al la ĉielo, etendplene suprenrigardis la okuloj. — Kia stranga aspekto! La luna virino plena de vera korega amo al la amato kaj plena de soifo al la vivo — kia gravega terura batalo! Nur malmultaj homoj travivas ĝin. Kiu estas la venkonto, la amo aŭ la vivo?

La koro de la pinido tremis je komparo, kaj li pensis: Se oni povus helpi al la bedaŭrinduloj! Volonte, volonte mi helpus! Sed ili ne komprenas nian lingvon!

Profunde ĝemante la junulino lasis fali la brakojn kaj turnis sin al la amato.

Tiu ĉi estis sidiginta sur ŝtonon apud la vojo kaj ploris. La ŝulroj konvulsie freege pro halpigata ĝemado. La tuta koro iroviĝis en ekstrema ekscitado. Frostotremante li ekkonis la teruran faktan, ke la lasta konsolato ŝajnis esti forlasanta lin.

Kiam la junulino ekvidis la amaton en tiu situacio, kvazaŭ klariganta fulmo trarapidis kapon kaj koron. Ŝia koro superfluis pro amo kaj kompatoj; sed en tiun ĉi sentojn miksiĝis maldolĉaj gutetoj de memakuzo. Kaj subite ekvekiĝis en ŝi la vera virina eco: la oferemo. Tiu sankta flamo ekkreskis en ŝia koro kaj superradiis ankaŭ ŝian fronton tiel, ke dolĉa supertera lumado elvenis el la okuloj. — Ĉio alia defalis — ŝi nur estis vera eterna virineco. — Ĉelscianta forto devenis el ŝi, trafuante la senkuragan junulon. Kaj ĉe la flamo de ŝia koro ekbruliĝis la lia. — Mallaŭte parolis la junulino: „Pardonu min, plej kara!“ Mi estis malbona.

La amato prenis ŝian kapon kaj kisis ŝian fronton.

„La amo en vi estas pli forta ol la vivo,“ li respondis. „Mi ekkonas la grandecon de via sento; amo de via amo trafus min kaj forigas ĉion malpuran, plenigas mian cerbon: La virineco, la vere eterna, suprentiras la homaron en la purajn aĵojn de Dia eterneco! — Venu nun, ni forlasu la teron sen bedaŭro! Kiu sentis unufoje la sanktan fajron en la koro, tiu povas prave diri: mi estas vivinta!“

Solece kuŝis la arbar-herbejo. Silente foriris la luno. Mallaŭte murmuris la akvoj. —

La pinido fariĝis en tiu ĉi nokto pinviro.

Oni diras, ke la provo de la pudingo estas la manĝado. Prefere diru, ke la provo estas la digestado kaj la ŝonĝo.

Ch. G. St.-M., B. A.